49 (67) - Julio/Aŭgusto 1983. ISSN 0150-5823



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista. 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 20 FF ĝirotaj al la poŝtkonto nº 3371 74 M BORDEAUX, profite al la eldonanto : Cercle amical espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT, Francio.

************************************************************

Novaĵo ĉe SAT-Broŝurservo :

# LA TURO DE L' POPOLOJ

de HAN RINER / Trad. de VALO.

Ĵus aperis en esperanta traduko la sepa verko de Han Riner : "La Turo de l'Popoloj". Ne multas la aŭtoroj tiel bone reprezentitaj en nia lingvo ! Tamen, ĉar eĉ en Francio, kie li vivis, liaj plimultaj verkoj ne plu estas disponeblaj, li estas relative nekonata. Kia domaĝo !

Por ke almenaŭ eta parto el la esperantistaro iom pli ek-sciu pri Han Riner, ni represas ĉi-poste la enkondukon de VALO por "La Turo de l'Popoloj". Sekvas biografia skizo verkita speciale por la legantaro de "Laŭte!".

Ĉio ĉi espereble instigu multajn konatiĝi kun tiu vere elstara figuro, amiko de Esperanto kaj de ties idealo.

# HAN RINER, La Turo de l'Popoloj kaj Esperanto

En 1936 Han Riner permesis al mi traduki liajn verkojn, interalie la "Tour des Peuples", kaj tre kuraĝigis min entrepreni tiun tradukadon. Tamen pri tiu ĉi mi tre longe hezitis. Mi timis, ke iuj supraĵaj legantoj kredos flari el tiu libro ian odoron de rasismo kaj antisemitismo.

Ĉiuj, kiuj persone konis lin aŭ sufiĉe familiariĝis kun lia verkaro, scias, ke tiuj ismoj staras je la antipodo de la rinera penso. En la romano, ja la simpatia persono estas la blonda Arjo Rifat, dum la ĉefaj kaŭzantoj de milito apartenas al la tribo de la "idoj de Sem". Sed, se oni ĝuste kaj funde legas, oni komprenas, kaj ne eraras pri la celo de la aŭtoro : celata estas ne la "raso" de la Semidoj, sed ja la mosea teologio rigardata kiel prototipo de la plej maltoleremaj fanatikismoj : nome la tri ĉefaj monoteistaj religioj.

En tiu libro Han Riner renovigis la miton pri la Babelturo. En lia fikcio la popoloj ne parolas komence unu lingvon, kiu poste disfalas en dialektojn ĝis perdo de la interkomprenado. Ĉiu popolo havas origine sian propran idiomon. En la kunlaborado por starigo de la Turo de l'Popoloj spontane kreiĝas speco de ĵargono, kiu pli kaj pli riĉiĝas. Tio ŝajne antaŭanoncas la mondlingvan teorion de Stalino, laŭ kiu tutmonda lingvo rezultos el natura kunfandiĝo de la naciaj lingvoj. Ni tamen scias, ke ne tia estis la ideo de Han Riner.

Pripensinte la demandon, Han Riner konkludis, ke tutmonda interkomunikilo povas esti nur planlingvo, kaj ke la vera praktika solvo estas Esperanto. Li ne kontentiĝis per vorta aprobo, kiel ajn elokventa kaj varma, kiel tro multaj eminentaj intelektuloj*. Li, kiel Tolstoj, volis scii per propra sperto, pri kio temas. Instigite de sia amiko Lanti, li komencis lerni nian lingvon, sufiĉe por almenaŭ flue legi ĝin. Leginte mian unuan provon de traduko de la "Kvina Evangelio", li bonvolis deklari ĝin "fidela kaj supla". Ĉu li estus uzinta tiujn vortojn, se li rigardus Esperanton kiel mallertan, malriĉan, malbelan lingvaĉon ?

Mi demandis lin, ĉu li ne intencus verki originale en Esperanto. Li respondis proksimume : "Mi jam pripensis tion, sed mi rezignis. Mi opinias, ke artisto devas limigi sin al la praktiko de unu instrumento, en kiu li senfine pliperfektiĝu. Mia instrumento estas la franca lingvo. Tial, jam antaŭ longa tempo, mi ĉesis verki en la provenca. Sed mi aprobas, ke bonaj esperantistoj elektu Esperanton por verki originale en tiu lingvo."

Se li do ne verkis mem en Esperanto, li almenaŭ deziris pli intime ekkoni per legado la Esperantan literaturon. Ni scias, ke tiucele, en la lastaj monatoj de sia vivo, li entreprenis pli fundan lernadon de la lingvo. Tiu fakto, kiel lia tuta sinteno, klare montras, ke por li Esperanto estas ne ia komerca kodo, sed vere valora instrumento, inda je atento kaj prilaborado.

-------

* En Francio Romain Rolland, Henri Barbusse, Jean Rostand, Georges Duhamel, Maurice Genevoix, k.c.



## H A N  R I N E R

### Biografiaj notoj

1861 - En Nemours (Oranio, Alĝerio) naskiĝas Ner Jacques Elie Henri ktp, de Jacques Ner kaj Virginie Campdoras lia edzino, ambaŭ de Rusiljona deveno.
Poste la familio loĝas en Montluçon 1862, Tarbes 1866, Rognac 1870. La pia knabo revas pri klerika profesio. En religiaj lernejoj la rigida disciplino iom post iom forigas lin de la naiva infaneca kredo.

1878, terurega bato : sur fervoja trapasejo lia patrino estas morte frakasita de trajno. La 17-jara junulo definitive rompas ĉian ligitecon kun la trompa kaj kruela Dio : li neniam fariĝos pastro.

1881 - 20-jara li estas nomumita help-instruisto en kolegioj : Aikso-la-Provenca, 1882 Draguignan, 1883

Sisteron.

1884 - Ĥolero atingas najbaran vilaĝon. Kun du amikoj Jacques-Henri tien iras por kontraŭbatali la epidemion, flegi malsanulojn, enterigi mortintojn. Lin mem trafas la terura malsano, sed li resaniĝas. Pro tiu kuraĝa sinteno li estas ordenita "akademia oficiro".

1888 - Kolegio de Gray, poste de Bourgoin.

1890 - Kolegio de Nogent-le-Rotrou.

1892 - Li perdas 7-jaran filinon, kiun li ŝanĝis al filo en la emocia "Livre de Pierre" (libro de Petro). En Nogent li estis avertita, ke gepatroj de lernantoj subskribis peticion kontraŭ lin, taksatan pri "Volteranismo". Li respondas al la departementa inspektoro : "Tiuj homoj eraras. Mi malŝatas Volteron, kiu kredis al Dio".

1895 - Lernhelpanto en Liceo Louis-le-Grand en Parizo.

1897 - Ĉar liaj unuaj verkoj estas malkonformismaj, la hierarkiaj superuloj opinias ne dece, ke li subskribas ilin per sia nomo, konata de liaj lernantoj kaj de ties gepatroj. Li ridetante konsentas: "Mi do adoptos pseŭdonimon : anstataŭ Henri Ner mi ekde nun subskribos Han Ryner" (ambaŭ estas en franca lingvo ekzakte samsonaj).

1899 - Liceo Charlemagne. Li instruas generaciojn da lernantoj, el kiuj pluraj, poste famiĝintaj kiel Jean Paulhan, konservas dankan memoron pri li kaj lia instruado.

1912 - Dum lia amiko Paul Fort estas elektita Princo de l'Poetoj, entuziasma junularo aklamas lin Princo de la Rakontistoj.

1914-1918 - Li sin levas kontraŭ la militisman etoson, kunlaboradas en kontraŭmilitaj gazetoj.

1918 - Mortas lia amatino Alice "Jacques Fréhel". Post la militfino li pli aktivas en la defendo de persekutataj senkulpuloj, fronte al militistaj tribunaloj, al regantaj aŭtoritatoj, al maljustaj leĝoj. Li oratoras en diversaj kluboj kaj popoluniversitatoj.

1922 - Li emeritiĝas, kaj de tiam sin dediĉas al sia filozofia verkaro.
Li luktas ĝis la fino de sia vivo, kaj mortas la 6an de januaro 1938.

VALO.





# ĉies voĉo pri rasismo

(reagoj pri "Vidpunkto de Nigra-Piedulo" -L! n°48)

## O P I N I O  D E  B L A N K A - B E K U L O
*******************************************

(La vorto "blanka-bekulo" estas traduko de la franca "blanc-bec", kiu estas, laŭ la 1978-vortaro "Robert-1", sensperta kaj pretendema junulo).

Sendube, ĉar mi estas sensperta deknaŭjarulo, mi estas naiva : leginte la ĉi-supre nomitan artikolon, mi miregis. Mi ne atakos, almenaŭ provos ne ataki, la tekston mem, sed aldonos kelkajn ĝeneralajn rimarkojn : fakte, kiel naivulo, mi opinias, ke ĉiu homo indas je respekto, kiam oni nenion scias pri li, t.e. ke oni ne devas malbone antaŭjuĝi lin. Do, unue mi havos bonan,,favoran opinion pri, ekzemple, la Magrebano, kiu estas antaŭ mi, kiu alparolas min, kaj se mi scios, ke li estas fiulo, mi malestimos lin, sed nur kiam mi scios tion.

Cetere, homo unue estas homo, kaj poste havas propran kulturon. Tio ne signifas, ke kulturo, civilizo...estas nenio, sed ke ĝi estas la rezultato de adaptiĝo de homo al la ĉirkaŭanta medio. Sed tiu adaptiĝo ne okazas ĉiumomente en la vivo, kaj homo, kiu adaptiĝis al iu preciza situacio, ofte konservas la juĝkriteriojn, kiujn li akiris dum tiu adaptiĝo, kiam li transiras al alia situacio, do li havas antaŭjuĝojn. Kaj la Eŭropanoj, kiuj vivas "kun" enmigrintaj Magrebanoj (oni ne troigu tamen : tiuj lastaj ne estas la duono de la Eŭropaj loĝantoj!!), frontas novan situacion, al kiu ili devas adaptiĝi. Certe, ankaŭ la alvenintoj devus readaptiĝi, sed estas malfacile, kiam la indiĝenoj estas malbonintencaj. Solvo eble estus miksado de ambaŭ kulturoj, kaj se okazus la sama afero tra la tuta mondo, la rezultato estus individua kaj ne plu grupa homo, pri kiu multaj personoj revis.

Fine, pri la landoj, kiuj ege malbone traktas la enmigrantaj laboristoj : la fakto, ke ilia sinteno estas tiu de multaj registaroj, ne pruvas, ke ili pravas, male, povas temi pri kolektiva eraro ; cetere, la esprimo "Lando de la Ruĝa Kruco" koncerne Svision estas ja facile formulebla alibio de lando, pri kiu oni povus prononci jenon : "Vi interbatalu, interbuĉadu, sed ne timu : ni gardas vian monon", eĉ se ambaŭ estas kritikeblaj kaj korektindaj.

Bruno Comentale (blanka-bekulo, duonitala parizanaĉo)

## V I D P U N K T O   D E   N E N I G R A - P I E D U L O

*****************************************************

Mi estas "Nenigra-Piedulo", ĉar mi loĝis dum longaj jaroj en Alĝerio (mi estis kvin-jara, kiam mi alvenis, kaj tridek-jara, kiam mi foriris) ; sed mi naskiĝis en Marseille kaj do mi estas "franca franciano". Dum la "Okazoj", kiel la Nigraj Pieduloj nomis la civilan militon en Alĝerio, mi ne volis partopreni, esti kunkulpulo de tia afero ; mi pensis, ke ni ne estis en nia patrujo. Se nigraj pieduloj ne konsentis fari francajn civitanojn el Alĝerianoj (antaŭe mi kredis, ke tiu povis esti bona solvo por tiu problemo) kaj se Alĝerianoj ne konsentis pacan intercedon, do ni nur devis reiri en nian patrujon.

Ĉar mi timis por mi kaj por mia familio esti mortigitaj tiel de unuj kiel de la aliaj, en tiu afero en kiu mi ne estis akordulo, mi pliŝatis foriri, tri jarojn antaŭ la paca fino.

°°°

Ĉu mi estas rasisto ? Mia patro, kiu estis "bona franco", kiam li militis en Pollando en 1918 kontraŭ Ruslando, edzinigis junan Polinon, kies patrino estis juda. Do mi estas samtempe franca, pola kaj juda. Sed ĉu vi konas veran Francon ?

Mi ne povas konsenti la apartigon en Sudafriko, mi ne povas konsenti la militadon de Israelo kontraŭ la indiĝenoj de la lando Palestino, kiujn ili forpelis ; mi ne povas konsenti la amasbuĉadon de Judoj dum la lasta mondmilito. Laŭ mi, la hispana elmigrinto, kiu venis en Francion dum Franko regis, se nun li volas stari en

(daŭrigo p.8)



## PRI LA INTERKONSENTA PROTOKOLO HERNU - SAVARY

Kun plezuro ni legis en la lasta L! la artikolon de VALO pri la "protokolo". Malgraŭ la silento de niaj gravaj respondeculoj, la informo pri tiu protokolo malsekretiĝis dank'al la agado de kelkaj asocioj. Lokaj agadoj disvolviĝis tra Francio.

Aprile, en Bordozo, kreiĝis kolektivo el jenaj asocioj: SGEN-CFDT, GAB (Bordoza anarkista grupo), Liberecanojstudentoj, ECOROPA, Pacista Unuiĝo, Pax Christi, Akvitania Alternativo, MDPL, AILP (Internacia asocio por la Libro de la Paco), MLA (movado por alternativaj luktoj), RIFG (Internacia rezistado de la virinoj kontraŭ milito), IATMA (Informado-agado en Akvitanio pri Tria Mondo), MAN (Movado por neperforta alternativo), Tero de Homoj, Ligo por Homrajtoj, Ĝirondia esperantista grupo, Liberpensuloj, Ter-Amikoj, L'Arche, MOC (militrifuzanta movado), UJAFAI (kontraŭfaŝisma movado).

Post la nacia kunordigo en Carmaux estis antaŭvidita agad-semajno kun kulmino la18an de majo. En Bordozo estis disdonitaj 3000 flugfolioj, multaj afiŝoj gluitaj ĉirkaŭ la lernejoj, universitatoj kaj kelkaj laborejoj.

La 18an de majo okazis manifestacio (300 partoprenantoj proks.). Neniu raporto aperis en la amaskomunikiloj. Samtempe cento da studentoj perforte manifestaciis. Pri tio la gazeto "Sud-Ouest" kaj televido multe informis la publikon.

La 26an de majo, okaze de la informa vespero, diapozitiva prezentado (realigita de CNT, Montpellier) pri la afero. Kopio de tiu ĉi diapozitivaro estas disponebla por informado en la liceoj, asocioj, entreprenejoj, kiuj deziras ĝin.

La 14an de junio la kunveno temis pri la venontaj agadoj : klopodoj ĉe la sindikatoj, la federacioj de gepatroj de lernantoj, pri disdonado de flugfolioj okaze de la SNI-kongreso en Bordozo de la 27a de junio ĝis la 1a de julio.

Grava kampanjo estas fiksita por la komenco de la nova lernjaro (afiŝoj kaj 5000 flugfolioj). Mitingo okazos fine de septembro. Propono pri nacia kunordigo estis farita okaze de paca tendumado en Albi, la 9an de julio. Por pli da informoj : Librovendejo L'EN DEHORS, 46 rue du Mirail, 33000 BORDEAUX. Tel 92 17 78.

(vd. ankaŭ p.29) Nicole - Ginette

Francio, estas tiel bona Franco kiel iu ajn alia ! Ĉu estas sama afero pri Araboj ? Laŭ mi tio estas unue ekologia problemo ! La vivo de iu besta specio estas esplorado pri ekvilibro (tute same por vegetala specio) kaj homo estas besto.

Kiam en Aŭstralion oni enportis kuniklojn, tiuj bestoj manĝadis ĉiujn vegetaĵojn kaj multe naskadis. Samtempe aliaj bestoj, kiel makropoj, malpliiĝis. Sen tiu fuŝegaĵo, miksomatozo (virusa malsano de kunikloj), Aŭstralio estus elruinigita.

En Francio, se ni ne pli ekspluatos la trian mondon per novkoloniismo, ni povos nutri ĉ. 35 aŭ 40 milionojn da homoj ; ne 50 aŭ 60 milionojn, kaj certe ne 100 milionojn, kiel diris kelkaj frenezuloj ! La Francoj vere ankoraŭ ne komprenis tion ; sed ĉar ili ne estas prahomoj, ili tamen komencis nature tian evolucion. Ili naskas malpli ol du infanojn en ĉiu familio. Samtempe, en Afriko aŭ en Azio, la evoluo estas tute malsama : la loĝantaro kreskas. En ĉiuj mahometanaj landoj dum la dudek venontaj jaroj la loĝantaro duobliĝos aŭ preskaŭ (Alĝerio estos ĉiamvenkanto en tiu sporto). Ĉu oni povos nutri tiom da homoj en tiuj malkreskantaj landoj, aŭ ĉu oni devos esperi pri pesto aŭ ĥolero, aŭ eĉ milito por ekvilibrigi tiujn popolojn ? Aŭ la solvo estus hordoj, kiuj invados eŭropajn landojn, same kiel en la tempo de Ĝinĝis-Ĥano ? Ne! Inside, laboristoj venas en Francion. Ĉu estus malpermesite veni en tiun landon, kiu,antaŭe, multe damaĝis ilian patrujon ? Kaj samtempe kapitalistaj entreprenoj multe ŝatas tiajn laboristojn : oni povas doni al ili iun ajn laboron, malbone pagi ilin, senproteste. Eĉ francaj laboristoj ne timis tian subproletaron, kiu akceptas laboradojn, kiujn ili mem ne konsentas fari. Tio ŝajnis bona afero por ĉiuj ! Sed post dudek jaroj oni vekiĝas ! Unu nova nasko estas ĉi tie. La "bonaj nigruloj" de la unua generacio naskis sep aŭ ok idojn en ĉiuj familioj. Estas bona afero en tiu lando havi multnombrajn infanojn ! Tiu produktado estas bone helpata. Eble, oni povas vivi nelaboranta, dank'al tio ! Oni povas inviti por veno ankaŭ la kuzojn kaj kuzinojn, poste la amikojn. Ju pli oni estos multnombra, des pli oni povos defendi sin. Tio estas paradiza lando ! Kiam vi ne volas labori, vi estas pagata kiel senlaborulo. Kiam vi iras en hospitalon, vi estas nutrata kaj pagata samtempe. Kion alian peti ?

Sed hodiaŭ la dua generacio estas ĉi tie... kaj ili ne plu estas bonaj nigruloj ! Ili lernis vivi proksime de Francoj, ili estas Francoj, kaj ne plu konsentas same kiel la gepatroj. Ili nepre postulas. Ili malofte laboras...

Sed la Araboj el Nordafriko ne estas solaj. Francio estis kolonia lando. Ĉu ĝi tro ekspluatis siajn koloniojn ? Tiu ne estas mia hodiaŭa demando. Sed oni bone, tro bone konas ĝin, ĝis la alia rando de la mondo. Kiam, en iu iama kolonio la loĝantaro tro kreskas, milito eksplodas, "popolaj ŝipoj" fuĝas. Kaj niaj bonkoraj "mondaj kuracistoj" kompate akceptas ilin. Por iri kien ? Ĉiam en Francion ! Nuntempe en kelkaj urboj de Francio ni havas kvartalojn, kiuj estas "ĉina urbo", "araba urbo", "nigrula urbo".

Ĉiam Francio estis tero de libereco : en nia lando revoluciuloj aŭ fuĝantoj estis bone akceptataj. Sed hodiaŭ Francio estas nur ujo, kien fluas la superfluaĵo de aliaj landoj. Ĉu tio estos nia estonteco ?

La nuna franca estraro ne volas kompreni tiun tre gravan danĝeron. La filozofio de maldekstruloj ne permesas pensi alie ol pri internacia amikeco, ŝati unu la alian, helpi la malfortulon, ktp.

L! proponas al nigra-piedulo legi Cazenove. Kion li diras pri la temo, mi ne volas scii. Mi volas diskuti kun dekstruloj aŭ maldekstruloj, kun alilandanoj, demandi al ili, kial ili volas vivi ĉe ni, anstataŭ reiri en sian landon, en kiu ili ne ĉiam estas malakceptataj, kie ili povas instrui siajn fratojn pri tio, kion ili lernis ĉe ni, batali por konstrui novajn landojn, progresemajn kaj pacamantajn...

Bedaŭrinde, mi iras en la nubojn ! Nur ekstremula estraro povos savi nin ! Aŭ niaj idoj kaj ididoj, se ili ne trovos miksomatozon, forpasos, same kiel Aztekoj aŭ aliaj rasoj, pri kiuj oni legas nur en historiaj libroj.

Kaj mi ? Mi nun estas frato de la nigraj-piedulo j, kiuj devis foriri el sia lando, eĉ se tiu lando ne estis ilia patrujo ; mi estas frato de palestinaj "ribelantoj",

kies patrujon oni ŝtelis ; mi estas frato de nigruloj en Usono aŭ en Sudafriko, kiuj suferas pro la superpotenco de blankuloj ; mi estas frato de popoloj, kiuj en Sudameriko kaj tra la mondo suferas pro la ekspluatado de usonaj kapitalistoj... Sed mi ne povas esti frato de la israelaj judoj, se mi, samtempe, estas frato de iu judo en mia lando; mi ne povas ŝati kiel fraton iun Arabon aŭ iun Azianon en Francio, ĉar ili estas grava danĝero por niaj infanoj kaj niaj idaroj. Mi jam eksentas jukon kaj mi demandas, kiun insektodetruilon mi povos uzi. Ĉu ni devos uzi saman teruran agadon kiel ili faris en Alĝerio ?

PAŬLO.

La "VIDPUNKTO DE NIGRA-PIEDULO" sugestis al mi la ĉi-subajn pensaĵojn kaj demandojn :

***********************************************

Evidente, liaj rimarkoj temas nur pri Alĝerianoj. Tiuj ĉi estas apartaj enmigrintoj ; la plimultaj el ili estis kvazaŭ truditaj migri en Francion. Laŭ li, la Alĝerianoj celas "okupi" Francion. Mi tutsimple opinias, ke ili, kiel ĉiu ajn homo, celas havigi al si vivrimedojn... Ja ili estas naskemaj, sed pro tio ili estas kompatindaj, precipe iliaj edzinoj, kiuj, ne tiel ŝatas tion ; mi scias, ke ili dezirus la salpingotomion, kiun francinoj ĝuis. Kulpas pri tio ilia religio (ĉu ĝi estas la nura ?!?) kaj la preskaŭ tutmonda mizogineco, kiu fontas, ĉefe, el la religioj. Pri la "familia kromsalajro", ja ĝi estas grava monhelpo ; sed se ĝi estus instiga motivo por naskigi, ĉu iuj francoj ne same reagas (is) ?

(...) "la nura kaŭzo estas, ke la Magrebanoj estas tro malsamaj, kaj pro fideleco al Korano deziras resti tiel"... Ĉu la plimulto el la homoj pripensas la animstaton de enmigrinto ?! Momente ili imagu esti enmigrinto... Forlasi siajn familianojn, vivmanieron, por iri en nekonatan landon, kies lingvon oni ne aŭ malbone konas, suferi la indiferentecon de la plimulto da loĝantoj, kiu estas suferiga preskaŭ samgrade kiel la malamo. Indiferentecon suferas ja urbanoj kaj maljunuloj en tiu malhumana socio ; sed, kiam oni estas fremda, tio fariĝas pli akuta.



Verŝajne, la unua enmigrinta generacio malfacile forlasis siajn diversajn kutimojn en sia familio ; eble, tiuj enmigrintoj trovis en ili kuraĝon por fronti kontraŭ la malfacilaĵoj. Pri la sekvanta generacio : ĝi tre volonte adaptiĝas al siaj novaj vivkondiĉoj, kaj la gejunuloj similas la samaĝajn francojn. Ĉiel, ĉiuj enmigrintoj bone rilatas kun siaj laborkamaradoj. Antaŭ dek du jaroj venis en mian urbeton multaj Magrebanoj ; tiujn, kiujn mi ofte renkontas mi afable salutas, eĉ alparolas. Mi konstatas, ke ili ŝatas tion kaj estas dankemaj. Nuntempe la gejunularo (inkluzive de la franca) estas ribelema pro la malbona situacio, precipe pro la senlaboreco ; sur tiu kampo la enmigrintoj suferas multe pli da malfacilaĵoj. Ofte okazas, ke ili ne estas dungitaj, ĉar ili estas enmigrintoj. Ĉu iuj komprenas kian perturbon la maldungo okazigas en la vivo de la maldungito ? Ja pro la cirkonstancaro nuna multaj maldungitoj tion konscias. Tamen, pro la ĝenerala senlaboreco, ili ne tute ĝuste komprenas la animstaton de maldungito en la pasinteco, kiam la mastro maldungas nur pro sia plaĉo.

Estas rimarkinde, kaj plorinde, ke ĉiam malamo por enmigrintoj koncernas nur la malriĉulojn, aŭ estas almenaŭ pli akra ol pri la aliaj, kaj ofte estas faro de mizeraj fratoj, t.e. salajruloj. Ĉu tiuj salajruloj akceptus la aĉajn laborojn, kiujn oni dediĉas al la enmigrintoj ? Tamen tiuj enlandaj salajruloj ŝatas, ekzemple, aŭtovojon... Observanto rimarkas, ke dum tia laborado la plej aĉajn laborojn plenumas la enmigrintoj. Antaŭ kelkaj jaroj en mia urbeto oni renovigis pontojn ; mi ne forgesas tion : enmigrinto kirlanta bolantan gudran duonlikvaĵon, kies eliĝintan haladzon li spiris.

Tiu Nigra-Piedulo ŝajnas mistaksi la valoron de la araba civilizacio... Ĉu oni memorigu al li, ke la nia fontas el ĝi ?... Kial la Nobla Korano, kaj ĝiaj religiaj dogmoj, ĝiaj okazintaĵoj, estus pli stultaj, pli malbonaj, ol tiuj de la katolika, kristana religioj ? Ĉu eblas al la katolikoj pruvi la ekziston de sia dio, pli ol la islamanoj pri Mahometo ? Ĉiel en sia familio ĉiu kultas kiun (kion) li volas.

Ĉu tiu Nigra-Piedulo tiel grumblas pro la invado de la usona civilizo : lingva trudo, muziko, trinkaĵoj, maĉgumo (ofte el kaŭĉuko, noca por la sanstato) kaj la usona

superregado per la fama dolaro ? Antaŭlonge ĉiuj civilizoj miksiĝis ; la nuntempaj veturrimedoj akcelas tian miksadon.

Ĉu la nunaj Nigraj-Pieduloj konscias, kio estas koloniado, koloniismo ? Ili, naskiĝintaj en Alĝerio, tute nature konsideris (as) tiun landon sia lando ; same, la Alĝerianoj naskiĝintaj en Francio konsideras Francion sia lando. Kompreneble, la nunaj Nigraj-Pieduloj ne ĝuste scias el kio konsistis la ekkoloniado, kiun spertis iliaj prapatroj aŭ geavoj. Ĉu ili iomete pripensis la aferon ? Ĉiu ajn koloniado postulis perforton. La nura celo de la koloniismo estas la ekspluatado de la grundriĉaĵoj. La enlandaj homoj, ĉefe la malriĉuloj (ne nur la koloniitoj spertas tion!) nenian profiton havis el tia ekspluatado. En Alĝerio, inter aliaj koloniitaj landoj, oni bruligis iliajn hejmojn, perfortis la virinojn kaj ofte ilin mortigis tuj poste, forprenis iliajn brutarojn kaj, laŭ la cirkonstancoj (dum la unua mondmilito) iliajn filojn por militi, kvankam oni asertis al ili : "Kondiĉe ke vi donu vian brutaron, viaj filoj ne militos". Tion mia patro konstatis. Pri Hindoĉinio iam mi legis, ke inter la du mondmilitoj militisto, celante "inteligente" sin distri, lokis petardon en la anuson de Anamano. Verŝajne, ĝis nun kaj eble neniam, Alĝerianoj ne tiel agas (os).

Kial aserti, ke neniam ili adoptos nian vivmanieron, almenaŭ ekster sia hejmo ?

Pri Svisio mi opinias, ke ĝi ne estas tiel gastama lando. Ŝokan skribaĵon por la vizitanto mi legis en hotelo sur paperbuŝtuko : "bone vin amuzu, sed nenion frakasu". Amikino, loĝanta en Ĵuraso, diris al mi, ke en Svisio oni ne rajtas forpreni eĉ ŝtoneton, nek planton ; sed Svisoj en decembro transiras la landlimon por elradikigi junajn abiojn.

Konklude : urĝas, ke la homoj sennaciece pensadu kaj agu, t.e. konsideru la terloĝantojn kiel frataron.

Suzana.

************************************************************

Pro (= dank'al) abundo de "materialo" por la ĉi-julia numero, la debato "Kiel aktivi por plu agiti?" aperos en la septembra numero. Ĉenleteranoj paciencu!



P R I   R A S I S M O

S-ano LUPO ne estas rasisto.

Rimarko : kiu konsentas esti tiel nomata ? Ofte mi aŭdis : "Mi ne estas rasisto, sed...". Nu, tio ĉi estis nur parentezo : mi ne rajtas suspekti la sincerecon de tiu simpatia Lupo. Do estas eble diskuti kun li serioze.

Unue mi parolos pri la Nigraj-Pieduloj. Mi konis kaj konas multajn el ili, de antaŭ kaj de post la sendependiĝo de la Magrebaj landoj. Ĉiuj, preskaŭ senescepte, estis / as rasistoj. Ili malŝatas ne nur la arabojn, ne nur la judojn (kvankam, en Alĝerio, ĉi tiuj de post la "Crémieux"-leĝo estas plenrajtaj francaj civitanoj), sed ankaŭ la metropolajn francojn, kiujn ili nomis "frankaŭi'". Preskaŭ ĉiuj, eĉ proletoj el Bab-el-Ued, havas komplekson de supereco. Tio estas la negativa aspekto de ilia karaktero*.

Alia aspekto estas pozitiva. De siaj gepatroj aŭ geavoj ili heredis kvalitojn kaj meritojn de pioniroj. Ili estas laboremaj, entreprenemaj, riskemaj, aventuremaj, progresemaj (t.e. emaj provi novajn teknikojn), antaŭenemaj : iel simile al la judaj pioniroj en Izraelio. Per tiuj kvalitoj kaj meritoj, per obstina laboro (sed ankaŭ, ni ne forgesu, per helpo de ekspluatataj indiĝenoj) kelkaj el ili atingis enviindajn situaciojn, amasigis riĉaĵojn - kiujn ili parte, ofte grandparte, kunprenis en sia ekzilo. Ĉar tiuj riĉuloj estis sufiĉe inteligentaj por ekziliĝi ĝustatempe, ne atendante la trudpremon, "la valizon aŭ la ĉerkon" - dum la malriĉaj, ĝis tiam atendinte, perdis ĉion, iuj perdis eĉ la vivon.

Do, tiuj riĉuloj, per sia savita mono, iafoje kun helpo de subvencioj aŭ de favor-interezaj pruntoj, investis en novaj entreprenoj, kiujn ili aŭdace kreis en kontinenta Francio aŭ en Korsiko - kie ilia meritita prospero naskis kelkajn sentojn de envio kaj ĵaluzo. La aliaj, eĉ ĉion perdinte, ne malkuraĝiĝis : ili decideme laboris kaj sukcesis vivteni sin kaj sian familion. Fine,

-------

* Tamen ili estas ĝenerale simpatiaj.

ĉiuj, riĉaj aŭ malriĉaj, pro siaj kvalitoj kaj sia simpatia karaktero, estis ĝenerale favore akceptataj, kaj per sia adaptiĝemo ili rapide asimiliĝas en la lando.

Nun pri la enmigrintaj magrebanoj. Unue, mi kontente notas, ke Lupo evitis la gurditajn asertojn, nome : ĉiuj araboj estas malpenemaj, mensogemaj, ŝtelemaj, malpuremaj, ktp. Liaj argumentoj estas pli seriozaj kaj valoras atenton.

Ankaŭ el arabaj enmigrintoj mi konas kelkajn. Estas vere, ke ili multe malpli facile asimiliĝas, pro diversaj kaŭzoj : lingvo, kulturo, kutimoj, moroj kaj precipe religio, ankaŭ tial, ke ili estas malbone akceptataj, ofte forĵetataj de la francaj najbaroj. Kiam ŝi estis juna knabino, mia nepino, kiu estas nigrahara, brunhaŭta, kun mediteranea tipo, estis mistraktita de siaj gekunlernantoj kaj de sia (nigrapieda) instruistino, kiuj kredis ŝin arabdevena.

Ankaŭ vere, ke la islama fanatikeco estas danĝera, kiel estis siatempe la kristana (kaj eble, kiel tiu ĉi refariĝus, se ĝi denove akirus sian iaman potencon).

Ankaŭ vere, ke la integristaj islamanoj, same kiel la ortodoksaj judoj-cionistoj, same kiel la sudafrikaj blankaj protestantoj, estas rasistoj.

Sed, precipe en la dua generacio, jam estas konstateblaj iaj ŝanĝoj en la moroj kaj kutimoj. Ni ne sendiskute proklamu, ke tiuj homoj estas neasimileblaj. Espereble, se ni ĉesos tenadi ilin en faktaj gettoj, en mizeraj vivkondiĉoj ; se ni havos kun ili pli bonvolajn rilatojn, iom post iom, per la kontakto kun liberpensaj kristandevenaj enlandanoj, ili evoluos al pli malfermita mensostato ; iom post iom ili liberiĝos de la tiraneca korana influo. Sed por tio necesas de nia flanko pli da komprenemo kaj bonvolemo. Se ni ĉesos kredi, ke nia civilizacio estas la sola (kiel la koloniistoj, kiuj volis ĝin trudi al ĉiuj "sovaĝaj" aŭ "barbaraj" popoloj, kiel la misiistoj, kiuj volis konverti ilin al sia kredo), se ni konsentos supozi, ke eble ankaŭ ili havas ion por alporti al ni sur la kultura tereno - tiam ni povos frukte diskuti kun ili, starigi interkonsentojn, eble konstrui kun ili komune homajn konceptojn.

Probable iuj taksos min nekuraceble naiva. Tamen mi persistas opinii, ke la celo valoras provpenon.

VALO.



Por la infanoj :

# la nubeto...

Ofte, kiam mi rigardas la ĉielon, mi celas ekvidi mian nubeton. Mi memoras la belajn rakontojn, kiujn li elvokas por mi.

Li rakontis al mi la belajn vojaĝojn, kiujn li faris, ĉar li venis de tre malproksime kaj trairis mirvekajn landojn. Li parolis al mi pri siaj eksterordinaraj renkontiĝoj kaj fabelaj aventuroj, kiujn li travivis.

Iun tagon, mi renkontis lin kaj demandis al li, de kiu regiono li originas, de kie li venas.

Li rigardis min per sia bela vizaĝo klara, kristalopura, fiksis punkton en la disto* , sed ne respondis al mia demando, kvazaŭ estus por li sekreto aŭ mistero. Kaj subite li rakontis jenan historion :

Li estis en la blua marvastegeco kun paĉjo kaj panjo, ili kune promenis, ĉar tre belis kaj varmis, kiam li sentis sin leĝera, leĝera, tiel leĝera, ke li ekflugis en la ĉielon.

Komence li estis tre surprizita vidi multajn novaĵojn de tiel alte. Infre ** , la maro, kiun li ĵus forlasis, formis grandegan vastecon. Li daŭrigis sian promenadon, lulate de la vento, kaj trafis la marbordon. Tio, kion li tiam vidis, ne plu estis blua, sed multkolora : verda, flava, ruĝa, ĉiuj tiuj koloroj, kiujn li ankoraŭ ne konis kaj kiuj konsistigas la teron. Li vidis landojn, en kiuj la homoj havas flavan vizaĝon, aliajn loĝatajn de negroj, kaj ankaŭ alian, en kiu la domoj estas tiel grandaj, ke li restis preskaŭ hokita per sia paltobasko.

De tiam li evitis ilin, ĉar li ne volis, ke sama aventuro reokazu. Krome, tiel alte promeni, tio kapturnigas, li diris al mi iun tagon !

Eble tial mi ne plu vidas lin : li iom ripozas !

J.P.Hennebois.

* malproksimo
** malsupre

# kaj la maro

# NIA DEBATO:

# la modo



(aliaj kontribuoj aperis en la n-roj 47 kaj 48)

Kutime mi ne reagas al artikoloj en gazetoj aŭ aliaj periodaĵoj, ĉu pro mallaboremo, ne-intereso aŭ ne-kompetenteco.

Hodiaŭ, leginte la ĉenleterajn kontribuaĵojn pri modo, mi tamen deziras memorigi al iuj kaj sciigi al aliaj pri periodo, en kiu la modo, diktita ne de komerco sed de politika konvinko, influis la vivostilon de grava grupo da laboristoj. Eble estis tia ideologia sinteno, pri kiu Kribo aludas, parolante pri diversaj faktoroj de la vivo.

Temas pri la tempo inter la du mondmilitoj, kiam la progresema parto de la nederlanda laboristaro, verŝajne sub influo de la maldekstra junularmovado, praktikis apartan vivmanieron, kiu koncernis multajn, se ne preskaŭ ĉiujn flankojn de la vivo. Oni volis ja plibonigi la socion helpe de tiu devizo : "Plibonigu la mondon, komencante per vi mem." Eĉ kanto ekzistis, kies refreno tekstis : "La homo estas bona."

Ĉu estis internacia modo, mi ne scias, ĉar laboristo de tiu epoko ankoraŭ ne havis tempon, nek monon, vojaĝi eksterlanden por proprasperte studi kaj vidi kutimojn de najbaroj.

Parolante pri ĉi tiu stilo, ni povas diri, ke la "pensanta" parto de la laborista klaso ne vestis sin burĝe, nek amuzis sin tiamaniere, nek meblis sian ĉambron burĝe.

Emancipiĝo signifis, ke oni nepre kondutu alie ol la burĝaro, la klaso, kiun oni malestimis : ni ne imitu la malbonajn ecojn kaj emojn de tiuj uloj. Same kiel oni ĉe virina emancipiĝo opiniis : Virino ne emancipiĝu, transprenante malbonajn ecojn de viroj, fumadon, drinkadon, blasfemadon.

Ekstreme sekvante tiun principaron, oni do ne fumis, ne trinkis alkoholaĵojn, ne surmetis pseŭdo-aristokratajn vestojn. Konata slogano estis : kiu pensas, ne drinkas ; kiu drinkas, ne pensas.

La virinoj ne portis ŝuojn kun altaj kalkanumoj, nek silkajn ŝtrumpojn, nek laŭmodajn robojn, ne frizis la harojn nek ŝminkis la vizaĝon.

La viroj surhavis koloran ĉemizon sen kravato, sen alta kolumo, sed kun Ŝiller-kolumo, korduroja pantalonon t.n. Manĉestran, kaj sandalojn.

Kontraŭuloj de tia vivmaniero parolis kaj eĉ ankoraŭ nun parolas pri "la kaprolanaj ŝtrumpuloj".

Sur la jako oni portis ofte la insignon kun rompita pafilo. La meblaro estis simpla, laŭeble el purkverka ligno, ne pseŭdo-antikva, kiun la etburĝaj familioj uzis.

Sur la muroj pendis reproduktaĵoj de famaj pentristoj, ekz. la "Sunfloroj" aŭ "La Pomarbeto" de Vincent van Gogh estis multvidata ornamaĵo en tia medio. Oni aŭskultis klasikan muzikon, admiris arkitektojn, kia Le Corbusier, legis verkojn de Ilja Ehrenburg, Hans Fallada, Ign. Silone, Upton Sinclair, John Steinbeck, Tolstoj, Emile Zola, samspecajn nederlandajn aŭtorojn kaj kompreneble Marks.

Kiam oni envenis hejmon de tiu "konscia" laborista familio, oni tuj vidis la diferencon inter ĝi kaj aliaj "normalaj" familioj, kiuj plejparte sekvis la oficialan komercan modon de kvazaŭ-altklasaj meblaro, vestaro,ktp.

Tamen la komerco sekvis la eksterajn signojn de tiu stilo kaj iom post iom tiuj penetris en la ĝeneralan modon.

Kompreneble, ĉiu, kiu kondutis nekonforme al sia grupo, eĉ se nur malofte, estis juĝata kiel renegato. Juĝi kaj kritiki iun laŭ la eksteraĵo estas ĉiam plej facile.

Ĉu ĉi tiu vivmaniero rilatis nur la eksteron kaj nenion plian estas alia demando. Entute la vivostilo pli kaj pli "burĝiĝis". Fakto estas, ke malmulto restis de tiu sinteno ; ĉu pro seniluziiĝo, ĉu pro kreskanta indiferenteco, ĉu alikaŭze ? Tial mi hezite kuraĝas ĝin nomi: modo.

Nur en la nederlandaj naturamikaj domoj konservigis unu restaĵo : la kutimo tie ne uzi alkoholajn trinkaĵojn. En la priparolita tempo la naturamika kaj junularmovadoj, la socialista partio kaj parto de la sindikatoj ja apartenis al kvazaŭ unu granda familio.
Sekve de tio tie troviĝis multaj abstinaduloj, nefumantoj, vegetaranoj, ateistoj, kontraŭmilitaristoj, anoj de unuiĝoj por seksa reformo kaj kompreneble ankaŭ esperantistoj.
Protestoj ekzistis kaj ekzistas en ĉiu epoko, tamen ĉi tiu protesta modo estis pozitiva, laŭ mi ; ĉu prave aŭ malprave, ĉi reguloj ekestis, por ke la vivo estu pli ĝuinda kaj malpli amara. Multaj aliaj modaj protestoj estis kaj estas plejparte negativaj : la sekvantoj scias, kion ili ne volas, sed ne kapablas tion anstataŭigi per io alia, pli bona aŭ malpli malbona.

Fine mi scivolas, ĉu en aliaj eksternederlandaj regionoj ekzistis samaj situacioj en tiu tempo, ni diru antaŭ 40 - 50 jaroj.

W.B.

*****************************************************

ĈIES VOĈO ... pri ... ĈIO AJN

*****************************************************

## Rebato al Suzana

Mi miras pro la aserto de Suzana, ke religioj estas la ĉiama lambastono de ĉiuj ŝtatoj. Mi informas tiujn, kiuj konas nek historion nek geografion, ke ekzistas ateistaj ŝtatoj, kun ateistaj ŝtatideologioj.

Jakelino.

## Pri "PI"

Prenu flekseblan metron kaj rondan skatolon. Mezuru la diametron kaj perimetron, dividu kaj havos "PI". Ĉu vi bezonas pli bonan demonstradon ? Konstatu, ke la centrangulo varias proporcie al la mezuro perimetra, do la sama nombro taŭgas por surfaco, tio estas ali-vorte kvadraturo. Problemo jam solvita de multaj jarcentoj ! (Laŭ-Biblie en la priskribo de la ornamaĵoj de la Templo). Nur la precizeco progresis, kiel dirite. Kelkaj sektoj ankoraŭ postulas, ke la Biblia valoro 3 estu devige instruata kiel dogmo en kelkaj Usonaj ŝtatoj !

P. M.-G.



## Pri K O M P U T - I L - O R - E R - OJ

*************************************

Laŭ-fundamente, maŝino estas ilo. KomputERO estas parto de komputo kaj komputORO flav-brila metalo, kiu servas por komputi. Dum la Akademio ne akceptas novan sencon por ORO, ekz. "valora aĵo, ilo aŭ ulo", komputilo restas la plej esperanta formo. Simplaj kalkuliloj aŭ mezuriloj ne estas komputiloj ! Ne ĉiuj komputiloj komprenas la anglan lingvon, ekzistas (brita!) komputilo, kiu komprenas la francan, kaj kelkaj aliaj akceptas la francan lingvaĵon LSE. Ekzistas ankaŭ tradukkartoj. Sed la fakuloj preferas uzi la anglan kiel pli internacian ! Eĉ la aldono de francaj literoj à anstataŭ @ , ç anstataŭ \ ktp, ne plaĉas al ĉiuj.
Oni povas pensi, ke post kelkaj jaroj E-o estos en la sama situacio, kiel nun la franca, sed tio ne estos kontentiga afero. Kelkaj E-aj maŝinoj estas ŝajna sukceso, dum la plejmulto da maŝinoj fuŝas la lingvon (la franca lingvo sen supersignoj kaj sen cedilo estas bone legebla dum E-o sen specialaj literoj estas tute erariga !).
Plie, kial perdi 10 jarojn, dum ĉiu povus aĉeti poŝkomputilon kaj eĉ uzi ĝin por lerni E-on, se nur oni uzus W por ŭ, Y por ĝ... ktp. Kial permesi la uzon de u por ŭ kaj ne w, kiu estas multe pli internacia ?
Tio estas fuŝa pensmaniero. E-istoj devus preferi internaciajn formojn ! Kial uzi ch, sh, gh, tute mallogikajn ? E-o evoluu al pli da logiko, ne al malpli ! E-o havas nur 25 fonemojn, 28 literoj estas mallogike troaj.
Se inventisto desegnas fervojveturilon, kiu ne povas uzi la relojn ekzistantajn en la plimultaj landoj, oni ŝanĝas la radojn aŭ metas adapteblajn radojn ! E-o devus adaptiĝi al la ekzistantaj maŝinoj por fakaj uzoj, kompreneble. Kelkaj vortoj havas jam du formojn : ĥino, ĉino, teĥniko, tekniko... Kelkaj pliaj ne fuŝos la lingvon, dum tre utilos : nur ludu skrablon !

P. M.-G.

## Mi proponas...

Por skribi pli facile esperantlingve per komputilo :
anstataŭ ĉ uzi cx, ŝ → sx, ĝ → gx, ĵ → jx,
ĥ → hx, ŭ → ux.

PAŬLO.



# VORTOJ DE MALJUNULO

----
valo
----

## ĈU KONTRAŬDIRO?

****************************

En L! 48 (66) mi publikigis tradukon de flugfolio, kiun mi titolis : "En Francio sub socialista regado". Per la elekto de tiu titolo, mi ŝajne atakis la francajn socialistojn, denuncante kontraŭdiron inter la doktrino de la partio kaj la agado de la registaro. Mi ne intencas enkonduki partipolitikan polemikon, sed mi dezirus klarigi, ke tia kontraŭdiro ne ekzistas.

Kiam ni parolas pri Jaurès (Jores'), ni emfazas ne nur lian konstantan luktadon favore al la laborista klaso, sed ankaŭ lian kuraĝegan pacistan agadon. Estas fakto, ke en julio 1914 li batalis per tuta sia energio kontraŭ la preparadon de milito, kaj ĝuste pro tio li estis murdita la 31an de julio. La milito eksplodis en la unuaj tagoj de aŭgusto. Se li estus pluvivinta, kiel li estus tiam reaginta ? Al tiu demando ni povus respondi nur per supozoj. Sed ni rimarkas :

1 - Tuj kiam la milito estis proklamita, la socialistaj parlamentanoj unuanime ĝin akceptis kaj aprobis. Du el ili ricevis ministrajn postenojn en la registaro de "Sankta Unueco".
2 - Jaurès mem ĉiam estis patrioto. "Iom da internaciismo forigas (onin) de la patrio, multe da internaciismo revenigas al ĝi."
3 - En sia libro "L'armée nouvelle" (la nova armeo) Jaurès klare esprimis sian penson : la armeo devas esti intime ligita kun la popolo, integrita en la nacio (ĝuste tion celas la ministra interkonsento, kiun ni denuncis).



El tiuj konstatoj mi deduktas, ke la nuna sinteno de ministroj Hernu kaj Savary estas konforma al la rekta linio de la socialista tradicio.

Mi ne scias, ĉu Jaurès, se li nun vivus, favorus kiel Mitterrand la nuklean armadon de Francio (la "rezignigan" forton), kaj aprobus kiel li la instaladon de usonaj misiloj en Eŭropo. Sed li neniam volis aboli la armeon. Komisiante al ĝi la nacian defendon, la nunaj prezidento kaj registaro agas logike, kaj ne perfidas la socialismon internaciistan.

La internaciismo estas bazita sur la ekzistorajto de sendependaj suverenaj nacioj. Ĝi celas al ilia kuniĝo, kiel iam en la Ligo de Nacioj aŭ nun en UNO, ne al ilia malapero per kunfandiĝo en unu tutmonda unio. La internaciistoj (socialistoj kaj komunistoj) estas unue naciistoj. Sendube ili sincere deziras pacan kunekzistadon de la nacioj, sed en okazo de konflikto inter nacioj, ili, entuziasme aŭ rezignacie, akceptas la militon. Por ŝirmi la pacon ili preparas la militon. Por defendi la nacion ili konservas kaj perfektigas militistajn rimedojn. Eĉ en Hindio la sinpretendantaj disĉiploj de Gandhi kreis potencan armeon provizitan per modernaj, eĉ nukleaj armiloj.

Por la grandega plimulto de la homoj, la nacia suvereneco kaj la nacia defendo estas netuŝebla dogmo. Ni ne esperas baldaŭ konvinki ilin, ke ili rezignu sian kredon pri tiu dogmo. Sed, se nur ili konsentus almenaŭ imagi, ke povus esti aliaj defendrimedoj ol la militistaj !...

(Vd. la broŝuron de J.Lasserre : "Ĉu militista nacidefendo estas kredebla ?").

VALO.

*****************************************************

## PRI NOVISMOJ

***********************

"Laŭte!" estas unika revuo, ĉar la ĉef-redaktoro akceptas lingvajn eksperimentojn. Eksperimentado pli valoras ol diskuto por certiĝi, ĉu nova vorto aŭ formo taŭgas ! Se legantoj ne komprenas, la proponita novaĵo fiaskis, se aliuj adoptas, bone, la afero certiĝas sen vana polemiko.

P. M.-G.

Nepripensita temo :

## V O R T L I M I G O   E N   E S P E R A N T O

*******************************************

Ni ne plu estas en la epoko de kandelo kaj bovĉaro, tial ni ne povas limigi la nombron da Esperanto-vortoj je 2000. Nepre necesas, ke ni kapablu nomi ĉiujn objektojn, kiuj nin ĉirkaŭas, tiel pri aŭtomobilo, elektro, kiel pri komputeroj. Sed tio ne estas la nura kaŭzo de tiu multnombreco de vortoj, la dua fakto emfazenda estas la tutmondeco de Esperanto. Necesas, ke ĉiu homo kapablu nomi la manĝaĵojn, la fruktojn, la vestojn, ktp, kiujn ĝi uzas ĉiutage. Ĉiuj Eŭropanoj konas : pomojn, pirojn, ĉerizojn, prunojn, ktp, eĉ oranĝojn kaj bananojn, sed tiuj lastaj ne estas la nuraj fruktoj en tropikaj landoj, multaj aliaj, nekonataj en Eŭropo, estas manĝataj ĉiutage en Afriko, Hindio, Indonezio... Same, ni ne povas uzi saman vorton por nomi bretonajn krespojn kaj meksikiajn "tortilla" aŭ hindian "ĉapati". Sario estas konata de ĉiuj, sed kiel nomi la "languti" de hindiaj kamparanoj, certe ne "pantalono", nek "pantaloneto", eĉ ne "hindia pantalono", ĉar en tiu lando estas pluraj specoj de pantalonoj.

Verdire, tio ne estas ĉio, la celo de Esperanto estas tutmonda komunikado, ne nur por turistoj kun limigitaj bezonoj, sed ĉefe por internaciaj sciencaj, teknikaj, fakaj kongresoj, simpozioj, ktp. Ĝis nun, nur angla lingvo estas uzata en tiuj kunvenoj. La rezulto estas, ke neanglalingvanoj nenion komprenas kaj ne kapablas diskuti, eĉ se, kiel plej multe el la sciencistoj, ili povas flue legi kaj ofte skribi la anglan lingvon. Tion mi spertis dufoje, mi defias iun ajn pruvi al mi la malon.

Konsekvence, mi antaŭvidas, ke estonte Esperanto fariĝos la plej riĉa lingvo, kiam ĝi estos uzata de ĉiuj tutmonde. Kompreneble, neniam necesis koni ĉiujn vortojn en iu ajn lingvo. Vortaroj kaj enciklopedioj ekzistas, ĉu ne ?

Aliparte, kiam Esperanto estos instruata en lernejoj, kiam ni lernos ĝin ekde juna aĝo, kaj uzos ĝin por instruiĝi, ni nature legos kaj pensos en Esperanto, ne plu estos problemo. Ĉu oni proponas redukti la nombron de la vortoj en gepatra lingvo ? Pro tiuj motivoj nepre necesas, ke Esperanto estu instruata en lernejoj kiel eble plej frue. Eĉ se temus nur pri unu lando kiel Francio, estus grandega komenco : unue formado en E. de profesiaj instruistoj grandnombre, due libro-eldonpovo senkompare pli granda kun ebleco eldoni fakajn librojn. Nun, nur en angla lingvo oni trovas iajn tre specialigitajn librojn, pro tio ke ne estas multe da legantoj en la mondo, kaj ke la angla lingvo estas la plej legata. Ja, Ĉinoj estas multe pli multnombraj, sed ekster Ĉinio kiom da homoj kapablas legi ĉinajn librojn ?

Nun plejmulte el la Esperantistoj lernis Esperanton pli-malpli bone, sed ne uzas ĝin ĉiutage, ĉar ili estas izolulo j. Tial ili ne kapablas nomi objektojn de ĉiutaga uzado kiel stablon aŭ karuselon, kaj multajn aliajn. Mi ne parolu pri sciencaj kaj fakaj terminoj : karburilo, piŝto, krankoŝafto... ne utilas daŭrigi. Ni tuj agnoskas, ke la plej multaj el la Esperantistoj ne konas tiujn vortojn, ĉar ni ne uzas ilin ĉiutage. En lingvo, praktiko estas la ĉefa afero.

Aliel, ne estas malfacile lerni vortojn, ĉiuj el ni lernis milojn da ili, nur gramatiko estas malfacila por multaj homoj. Ekzemple, por ĉiuj, kiuj parolas lingvon sen deklinacioj, la uzo de akuzativo estas ege malfacila. Kaj ili estas multaj ne nur en angla kaj latinidaj lingvoj, sed ankaŭ en malajo-polineziaj kaj ĉiniaj lingvoj ne estas akuzativo, kaj verŝajne en multaj aliaj lingvoj, pri kiuj mi havas nenian konon (araba, afrikaj ?).

Pri komputero* : ĉiu scias, ke oni uzas ĉifrajn lingvojn (Fortran, ktp) por komuniki kun tiuj aparatoj. Tial, kiam temos pri Esperanto la manipulantoj uzos alfabeton tiacele, ĉu tute artefaritan, ĉu iom modifitan rusan alfabeton, kiu entenas 32 literojn, aŭ Devanagari-alfabeton (sanskrito kaj hindiaj lingvoj), kiu entenas pli ol 40 literojn. Dume, la aliaj homoj uzos la malnovan Esperantan alfabeton tute simple.

Konklude, la limigo de la Esperanto-vortaro ne trudiĝas. Per kelkaj ekzemploj mi montris, ke ankoraŭ multaj

-------

* Laŭ PIV - ni neniam hezitu konsulti ĝin - komputilo estas mezurilo por kvanto da elektro, akvo, ktp, dum komputero estas elektronika aŭtomato.

vortoj mankas, aŭ estas tre malbone konataj de la Esperantistaro. Mi parolis nur pri sciencaj kaj fakaj vortoj, mi lasas al akademianoj, verkistoj, poetoj, la taskon ekzameni ĉu vortoj kiel : olda, pigra, ktp, estas necesaj aŭ ne.

J. DEKER.

*******************************************************

Maljunulo rakontas :

## M A L B O N A   Ŝ E R C O

Horo "nulo". Ĉu tio estas noktomezo aŭ komenco de la nova tago ?... Ne gravas.

Vintre, je la tria nokte, mia telefono sonoris. Mi pensis, ke estas erara alvoko, sed ne... estis alvoko de la plej granda dancejo, en la malgranda urbo, en kies ĉirkaŭaĵo mi loĝis en tiu epoko.

Mi loĝis ĉiam en ĉirkaŭaĵo de urbo, ĉar la lupago estis malgranda, la ĉambro pli komforta, kun telefono kaj tramvojo por iri al mia laboro en la urbo.

La alvokanto sin prezentis kiel sinjoro Iks, estro de la dancejo, kaj petis, ke mi venu urĝe por ripari "elektrecon". Por konfirmo de tiu neĉiutaga peto, mi provis retelefoni, sed la telefona numero estis daŭre okupata.

Post kelkaj telefonadoj mi trovis fine taksion ĉe la fervoja stacidomo kaj min veturigis al la centro de la urbo, al la dancejo.

Dum mi proksimiĝis, mi vidis la grandan luman reklamon normale funkcii. Do mi pensis, ke eble io en la danc-halo ne funkcias. Alvenante antaŭ la enirejo, mi vidis, ke la lumanta ŝtuparo estas en ordo. Sekve, mi mire malsupreniris al la kasistino por demandi, ĉu ne estas paneo en la danchalo aŭ la kuirejo.

La kasistino respondis, ke ŝi ne scias, sed alvokis telefone la estron, al kiu mi eksplikis, sed ankaŭ li nenion sciis. Vidante, ke mi alvenis vintre kaj nokte per taksio, li ordonis al la kasistino doni al mi monbileton por miaj elspezoj de veno kaj reiro.

...

Post kelkaj monatoj la telefono - ĉiam la telefono - sonoris, kaj mi rekonis la voĉon de la estro petanta, ke mi alvenu por malgranda laboro. Kiam mi alvenis, post kelkaj afablaj vortoj, tiu homo mendis grandan, plurmonatan laboron, kaj la profito permesis al mi edziĝi...

-nn-



Eble ĉiuj Okcidentanoj konas la "kontraŭvirinan" legendon pri Adamo kaj Eva : ke ĉi tiu, la unua virino, "konstruita" de La Dio el ripo de Adamo, la unua homo, donis poste al sia edzo por manĝi la frukton de l'arbo de l'Scio, al li malpermesata de La Dio, kaj pro tio ŝi perdigis al li la eblecon iam fariĝi senmorta. Sed ne ĉiuj scias, ke la Biblia legendo estas eble "spegula" kopio de tre antikva historio kojn-signe registrita sur multmiljaraj argilaj tabuletoj, tio estas :

# LA HISTORIO PRI EA KAJ ADAPO

## AŬ : LA NEPROFITITA ŜANCO

(resumis Ĝiz el Lamark la version de Prof-ro T.H. Gaster en "La Plej Antikvaj Historioj")

Iun tagon Ea, Diuĉo* de l'Saĝo kaj Scio, decidis krei estulon kun homa aspekto sed saĝo dia. Do li malsupreniris sur la Teron kaj en la sankta urbo Eriduo** li konstruis la estulon, kaj li nomis lin Adapo.

Tiel saĝa fariĝis la kreitaĵo, ke nenio en la ĉielo aŭ sur la tero preterpasis lian komprenadon. Kiam li parolis, estis kvazaŭ parolus diuĉo, kaj neniu homo povis kontraŭdiri liajn vortojn.

Neniu arto kaj neniu metio estis, pri kiuj li ne estis majstro : li scipovis kuiri kiel kuiristo, fiŝkapti kiel fiŝkaptisto, ĉasi kiel ĉasisto.

Kaj li estis tiel bonkora, kiel li estis saĝa : li obeadis ĉiujn leĝojn diajn kaj persone zorgadis pri la

-------

* "Dio" estas hindo-eŭropa titolo, kiu signifas "luma (Sinjoro)" ; mi aldonas la seksan sufikson, kiam ĝi uzatas ĝenerale, kaj la artikolon ("La" Dio), kiam ĝi rilatas al la nenomata diar-estro (kiu en ĉi tiu legendo nomiĝus En-lil laŭ la Sumeranoj, Marduk laŭ la Babilonanoj, Assur laŭ la Asirianoj).

** Eridu, tre antikva sumera urbo en la Suda Mezopotamio (nuna Irako); tie oni elfosis multajn strangajn statuetojn pri "serpento-geviroj".

sekureco kaj bonstato de la urbo Eriduo, kie li loĝadis.

Iun tagon li iris fiŝkapti por sia sinjoro Ea.

Malproksimiĝinte de la bordo en malgranda boato, li jam komencis fiŝkapti, kiam jen alflugis la Ventegbirdo kaj per siaj gigantaj flugiloj ekkirlis la aeron kaj la akvon ĉirkaŭe. Supren-malsupren, tien-reen skuiĝadis la boato, ĝis fine ĝi renversiĝis kaj Adapo sin trovis naĝanta inter fiŝ-amaso. Kun flama kolero li svingis la pugnon kontraŭ la birdego kaj malbenis ĝin elkore, kaj tiel potenca estis la Adapo-a malbeno, ke krak! rompiĝis la flugilo de l'birdego.

Tagon post tago, la maro aspektis el oleo, eĉ ne venteto blovis sur la tero ; ĝis La Dio* tion rimarkis, kaj alvokis Ilabraton, la flugilan mesaĝiston de l' ĉieluloj.

"Kial ne plu flugas la Ventegbirdo?" Li demandis, kaj tiu respondis, ke la homa kreitaĵo, kiun Ea kreis lastatempe, ĝuste rompis al ĝi la flugilon per malbeno potenca. Pro tio ekflamis La Dio-a kolero, ke mortulo tion aŭdacis, kaj Li sendis Ilabraton alvoki la kulpulon antaŭ la ĉiela kortumo.

Sed Ea, la saĝa kaj favorkora, venis antaŭtempe kaj helpis sian fidelan servanton : "Adapo - li admonis - malplektu viajn harojn**, priŝutu vian kapon per cindro kaj vestu vin per sakaĵo : kiam vi atingos la ĉielan pordegon, vi trovos tie du gardostarantojn, kiuj baros al vi la vojon kaj postulos de vi la kialon de via mizerega aspekto. Kaj tiam vi respondos : "Du dioj potencaj malaperis de sur la tero, mi venis ĉi tien por plori pri ili kaj petegi de La Dio ilian revenon." Ili demandos, kiuj estas la malaperintoj, kaj vi diros : "Tamuzo kaj Giŝtsido"***

-----

* Vd. * p.25

** por montri profundan funebron, grandan ĉagrenon ; la tiamaj viroj sumeraj portis longajn, bele plektitajn kapharojn kaj barbon.

*** Tammuz kaj Gishzida, ambaŭ diuĉoj de l'naskigpovo ; laŭ la mito, tiaj dioj malaperas (aŭ mortas) dum la seka, varmega somero kaj reaperas (aŭ renaskiĝas) en la bona sezono. La fideluloj ploris ĉiusomere ilian malaperon, kaj festis poste ilian reaperon.



Kaj ĉar tiuj estas la gardostarantoj mem, tial ili kortuŝiĝos pri vi kaj vin akompanos ĝis antaŭ la Dio-a trono kaj pledos por vi antaŭ la dia Juĝanto. Kaj kiam Lia kolero estingiĝos, Li ordonos, ke oni alportu al vi por manĝi kaj trinki, sed vi ne tuŝu tian manĝaĵon, ĉar ĝi estus al vi manĝaĵo mortodona, kaj vi ne tuŝu tian trinkaĵon, ĉar ĝi estus al vi trinkaĵo mortodona.

Memoru bone mian admonon, neniom de ĝi forgesu !"

Kaj Adapo faris ĉion laŭ la konsiloj de Ea, kaj efektive Tamuzo kaj Giŝtsido, kortuŝitaj pri li, lin akompanis mem ĝis la trono de La Dio.

Kaj tiu leviĝis kaj ekkriis en kolero, kial li do rompis la ventegbirdan flugilon, kaj vere harstariga vidaĵo estis la Dio-a kolero !

Sed Adapo ne teruriĝis kaj trankvile respondis tiele : "Mia Sinjoro, jen kiel statas la afero : Mia Sinjoro Ea faris min la plej saĝa el la homoj kaj malkaŝis al mi la sekretojn de l'ĉielo kaj de l'tero. Pro tio mi dankas lin laŭ mia povo, pretigante por li ĉiutage ian frandaĵon. Iun tagon mi estis fiŝkaptanta, kiam alvenis la ventegbirdo kaj malice perdigis al mi la fiŝaĵon kaj al Mia Sinjoro Ea la manĝotaĵon. Tial blindigite de kolero mi malbenis ĝian flugilon, kaj jen kiel ĝi rompiĝis."

Kaj venis antaŭen Tamuzo kaj Giŝtsido, kaj ambaŭ ili kliniĝis antaŭ La Dio kaj pledis por Adapo.: "Sinjoro La Dio, ĉi tiu Adapo ne estas mensogema malpiulo, male, li estas pia kaj respektema kaj kultas la diojn : eĉ nun, en danĝero de sia propra vivo, li funebras pro nia malapero kaj venis petegi de Vi nian revenon. Ne kalkulu do senvolan agon kiel krimon, kaj ne volu kondamni lin pro tio!". Ĉe tiu peto estingiĝis la kolero de La Dio, kaj Li ordonis :

"Ĉar Ea faris vin saĝa kiel la dioj, kvankam home vi aspektas, al lia dono mi volas aldoni la rangon dian. Prezentu do al li nian manĝaĵon kaj trinkaĵon, ke li manĝu kaj trinku kiel unu el ni, kaj li estu kalkulita kjel* unu el ni!" . Sed Adapo rememoris la admonon de Ea, kaj la alportitaĵon li ne tuŝis. Tial pri li mokridetis La Dio : "Ha, malgraŭ tiom da saĝo Adapo estas nura homo,

-------


* kjel = identiga, ne kompara "kiel" : la antaŭa "kiel unu el ni", male, estas kompara.

ĉar li rifuzas la manĝaĵon kaj trinkaĵon, kiuj lin diigus! Forportu la kreitaĵon de antaŭ mi, kaj returne li iru sur la teron!"

Sed poste rememoris La Dio la piecon de Adapo, kaj ordonis al Ninkaraka, Diino de l'Sano, ke li estu ŝirmata kontraŭ ĉiaj malsanoj, pestoj kaj malfeliĉoj, kaj li povu ĝui inter la homoj vivon longan kaj feliĉan, en la sankta urbo Eriduo, kie ankoraŭ nun liaj heredantoj regas.

## K U R I O Z A Ĵ O

En la lingvo de l'moderna biohemio, a-da-po (ADP) estas la kutima mallongigo de l'nomo de molekulo, en kiu kuŝas la rezervoj de ĥemi-energio de la vivaj estaĵoj. Kvankam Ea ne konis (?) la modernan ĥemion, li donis nomon ja taŭgan al sia ENERGI-PLENA kreitaĵo !




MOLEKULO DE ADP

RECEPTO POR VERKI MEM SCIENCOFIKCIAN RAKONTON
*********************************************

Legu atente la "historion pri Ea kaj Adapo" ; se vi volas relegi la Genezon en la Biblio, ankaŭ tio povas utili : memoru nur, ke verŝajne oni tie "interŝanĝis" ĉiujn rolojn : ekzemple la serpento fariĝas maliculo, dum ĝi reprezentas la medicinon, kuracarton, senmortecon ktp, do en la originala mito ĝi estas Doktorino Ninkaraka. Kiu sugestis al Ea "fari" estulon kun la parapsiĥaj povoj de la "dioj" ? Kiu donis al li la materialon, la ripon - pardonu, la *ribonukleaĵon (RNA aŭ DNA) por hibridigi la homan specion kaj doni al ĝi ne nur instruon (jam tio estus danĝera!) sed ankaŭ telepation kaj **psiĥo-kinezon ktp ?

Ha, kiel senprudentaj estas la scienculoj ! Ili meritus ja, ke oni forlasu ilin sur la Tero por "manĝi la polvon" dum la tuta vivo !

N.B. Se vi ne volas, ke via rakonto fariĝu pornografia anstataŭ sciencofikcia, NE parolu pri T-amuzo kaj Giŝt-sido, kion ili faris kun la homaj virinoj kiam sur la Tero ne estis tro varme, ktp, ktp... Krome, bonvolu respekti la privatecon de Ea kaj ne tro ĝisfunde esplori liajn personajn rilatojn kun Adapo.

Bonan amuzon !

Ĝiz el Lamark.

-------

* en RNA kaj DNA estas la tuta gen-heredaĵo de ĉia viva estaĵo de ni konata ; la nunaj (homaj) sciencistoj jam komencis miksi la genojn por produkti novajn speciojn vegetalajn kaj animalajn kun dezirataj ecoj.

** psiĥokinezo, aŭ telekinezo, estas la psiĥa kapablo efiki senpere super la materiaj objektoj ; bedaŭrinde, ĉe la Adap-idoj ĝi estas ofte senkontrola.

**************************************************

Ĉiam kaj plu pri la fama "Simbiozo Armeo-Edukado" en Francio :

La francaj legantoj de L!, kiuj volas aktivi kontraŭ la "Simbiozo Armeo-Edukado", povas sin turni al : C.O.T., BP 229, 81002 ALBI CEDEX, kiu kunordigas la agadon kaj eldonas ligilon : "Ramassis" (!). Ankaŭ estas disvendataj kovertoj pri la sama temo ĉe : Bruno BARRILLOT, Chessy les Mines, 69380 LOZANNE (prezo laŭ kvanto).

**************************************************

La venonta numero : komence de septembro !

# Kiel ĝi naskiĝas

- Nia ŝvitoplena felietono -

Kiam ĉiuj ofsetplatoj estas pretaj, necesas ofseti. Mi uzas brokante akiritan ofsetilon, kies funkciadon estus malfacile kaj tede klarigi. Mi lernis per la praktikado, do ĉefe per la eraroj. Notu nur, ke necesas kelkaj plenumitaj kondiĉoj : taŭga temperaturo de la ejo (por la flueco de la ofseta inko), taŭga papero, ktp. La "ejo" estas tute eta ĉambro altplafona, sen hejtilo, situanta teretaĝe de la stacidomo, kie iomete deĵoras la eldonanto por sin distri post (eĉ dum) la eldonhoroj. Venu, mi surloke klarigos al vi, se ĉio glate funkcios. Se io malglatos, mi skoldos la diablon kaj eligos vin sovaĝule el la presejo. Mi restos sola por batali kontraŭ la maŝino kiel mezepoka heroo...

Se venkos la maŝino, se mi kapitulacos, tiam mi povos retajpi la tuton sur stenciloj, kio necesigos aliajn zorgojn, sed pri tio ni ĉi tie ne parolu nun.

Efektive, la presejo estas tiel malvasta, ke ne eblas al du fuŝantoj fuŝi samtempe. Tio povas esti avantaĝo.

LA BROŜURADO

La presado estas finita. Vi forbalais el la presejo ĉiujn fuŝitajn foliojn kaj la hartufojn, kiujn vi malespere elŝiris el via kapo - se vi ne jam estis kalva -, vi zorge elinkigis viajn fingrojn, vian nazon, vian kravaton (?) kaj vian iam blankan ĉemizon... nu, ek! nun al la broŝurado. Vi povas eksidi.

Vi rikoltis por 36-paĝa "Laŭte!" 9 stakojn da folioj, kiujn nun vi devas faldi, prefere en la mezo. Ne komplika afero, mi ne klarigu, vi el...turniĝu. Tamen, faldu tiel ke la paĝoj estu en sinsekvo, 3/4/5/6, kaj ne 5/6/3/4 ! Samtempe kontrolu, ĉu ne enŝoviĝis nur unuflanke aŭ fuŝe presita folio.

Fine vi kolektu la foliojn el ĉiu stako por konsistigi la "korpon" de la bulteno, ekzemple de la paĝo 3 ĝis p.34. Stakiginte ĉiujn "korpojn" vi zorge ordigu la foliojn, por ke la dorsrandoj estu strikte ebenaj kun ĉiuj folioj samnivelaj. Tiun laboron oni ne priskribas, prefere ĝin fari surloke. La broŝurilo estas vi. Vi uzas ferplataĵojn, kiujn vi prunteprenis nokte ĉe la fervojo, por premi la folistakojn, kies "dorson" vi zorge ŝmiros per speciala plasta gluo, abomenaĵo, kies tokseco fuĝigas Suzana-n, kiam ŝi forgesis sian maskon. La kutima broŝuranto naskiĝis kun natura masko sur la vizaĝo (kio klarigas kial li aspektas tiel bela, eĉ post jardekoj da broŝurado).

Kiam ĉiuj stakoj estas sekaj, vi detranĉu aparte ĉiun bultenkorpon kaj gluu al ĝi la kovrilfolion 1/2-35/36. Tio postulas sume "kelkajn" horojn, kiujn vi povas agrabligi - se neniu kunlaborant(in)o estas surloke por kunbabilado - per ĵazaŭskultado. La eldonanto havas neelĉerpeblan ĵazdiskaron, por kiun aŭskulti li bezonos jardekojn da broŝurado.

Ĉu vi finis la "kovradon" de via numero ? Bone. Nun ek! la tutan materialon vi portu al la papertranĉilo - tre utila aparato, per kiu vi tranĉas la dekstran randon de "Laŭte!", por ke ĝi estu ankoraŭ pli bela, dank'al konsilo de amiko L.M. La tranĉilo krome utilas por adaptigi manfingrojn al tro malgrandaj gantoj. Prefere ol maltriki kaj retriki viajn gantojn, vi povas redukti la longecon de la fingroj. Tio estas pli rapida, kaj vi ne plu timas froston ĉe la ekstremaĵoj. Dum pluraj jaroj la papertranĉilo kuŝis en la subtegmentejo kaj pro pigro (du ŝtuparoj grimpotaj kun pezaj skatoloj en la brakoj) mi ne tranĉis la bultenrandon. Nun ĝi kuŝas apud la stacidomo en kabano atingebla sen ŝtuparo...

Sed ni ne ŝercu, atendas vin nun la subbanderoligo.

***

Ĉu vi jam preparis la banderolojn ? Kun ĝisdatigo de la abonant-listo ? Kiel tio okazis ?

Antaŭe, mi multobligis stencile la adreslistojn, uzante glupaperajn foliojn, kiujn mi poste distondis. Sed senĉese okazas modifoj... La stenciloj ne longe utilis. Nun mi preparas la samajn listojn sur ordinara papero kaj senĉese ĝisdatigas ilin. Lastmomente antaŭ la ekspedo mi fotas la listojn sur glupaperaj folioj - kio ne ĉiam iras glate - kaj same distondas, por glui la adresslipetojn sur la banderoloj aŭ sur la kovertoj. Banderolojn mi uzas por Francio, kovertojn por aliaj landoj. Vi divenas, ke necesas post la bulten-enŝovado aŭ subbanderoligado, glui la banderolojn, fermi la kovertojn kaj afranki.

Por Francio ne necesas glui poŝtmarkojn. Vi pagos al la poŝtoficejo laŭ rabata tarifo, sed tiun rabaton oni meritu ! La bultenoj estu klasitaj laŭ departementoj, tiel ligitaj per kaŭĉukaj ringoj, kun numero de la departemento sur ĉiu staketo. Krome, la banderoloj devas nepre surhavi iujn leĝajn menciojn. Rigardu unu vian banderolon, vi ekscios. Kompreneble, la sendado al la francia abonantaro okazu samtempe. Izolitajn ekzemplerojn oni ja devas afranki kiel ordinarajn leterojn. Pripensu, ke neakurata reabono, kun sendado de antaŭa numero, krome kostos preskaŭ 2 frankojn pliajn al la kaso, kaj vi komprenos, kial tiel gravas por la kasosano la akurataj reabonoj!

Por sendi eksterlanden vi gluu mem la necesajn poŝtmarkojn, plej ofte 3 aŭ 4 malsamajn por ĉiu koverto.

Ankaŭ tio postulas iom da tempo. Sed prefere ne estu muzika perturbo. Vi nepre atentu neniun forgesi, kiam vi ekspedas "Laŭte!"n. Nericevanto foje strange reagas, depende de la cirkonstancoj. Se ŝi/li avide atentas sian gazeton, vi rajtos skoldleteron (maloftaĵo) ; se ŝi/li abonas nur por havi trankvilan konsciencon, sed fakte ne legas, ne estas problemo (krom, ke al tiuj ni preferas konsili malabonon) ; se ŝi/li estas pesimismema pri la E-movado ĝenerale, ŝi/li opinios, ke jen, pft!, "Laŭte!" malaperis (Unu plia E-gazeto en la mortintejo, ne miriga afero!...), sed ŝili ne reabonos...

Tio ja apartenas al alia kampo, tiu de la administranto/kasisto, pri kiu eble ni parolos venontfoje. Ni ne konfuzu !

KIOM DA PAĜOJ HAVU "Laŭte!" ?

De tio dependas la pezo, do la afranko. Por eksterlando estas tarifo ĝis 50 gramoj, poste ĝis 100 gramoj. Por Francio, sama kosto ĝis 100 gramoj. Do, kutime "Laŭte!" estas 50-grama (t.e. 36-paĝa). Ĉiu seka folio pezas 5 gramojn kaj oni aldonu la pezon de la banderolo aŭ koverto (kaj la malsekecon pro via surfalinta ŝvito). Kiam restas multe da "materialo" en la redakcia tirkesto, kaj ĉiujare kiam aperas en julio la adresaro, mi antaŭvidas 100-graman numeron - 68- aŭ 72-paĝan - kiu forfuĝigas la nelegemulojn sed kuraĝigas la verkemajn abonantojn, kaj krome mortigas per ĵaluzigo ne tiel feliĉajn, ne tiel ŝvitajn bultenredaktantojn.

Kribo.



Teddy Löwenkopf (Israelo) :

# Kie la ekvilibro ?

Je mia artikolo "Kio estas cionismo?" (eble estus preferinde titoli ĝin "Kial mi fariĝis cionisto?" alvenis kelkaj reagoj - iuj laŭdaj, aliaj kritikaj. Mi intencas reagi al tiu aperinta en "Laŭte!" n-ro 48, paĝoj 40-42.

En la alineo "Iom da historio", la verkintino vicigas en kronologia ordo faktojn ligitajn kun la politika cionismo. Tiu ĉi listo montriĝas tre ege tendenca, ĉar mankas al ĝi la reago de la alia flanko. Jam en 1921 eksplodis araba teroro, poste en 1929, kaj dum tri sinsekvaj jaroj en 1936-1939. En aprilo 1929 estis amasbuĉitaj en Hebron dekoj da junaj studentoj de teologia lernejo, kiuj eĉ ne posedis armilojn por sin defendi. Paralele kun la kontraŭjuda teroro estis lanĉita ankaŭ interna teroro kontraŭ moderaj araboj, kiuj inklinis al kompromiso kaj "modus vivendi". Tiu tendenco daŭras eĉ niatage ; antaŭ nelonge estis murdita Sartawi, aganto de PLO, nur pro tio, ke li kontraŭis teroron !

La 29an de novembro 1947 pli ol 2/3 de la membroŝtatoj de UNO voĉdonis por dispartigo de Okcidenta Palestino. Jam la morgaŭan tagon eksplodis senbrida araba teroro, postulanta milojn da viktimoj. Kio okazis en Deir-Jasin estis bedaŭrinda tragedio, tamen rekta sekvo de longa ĉeno da kruelaj murdoj fare de la araba flanko. Laŭ la konata proverbo "kiu semas venton, rikoltos ŝtormon" ; la araboj semis ŝtormon kaj rikoltis uraganon. Ili volis akapari ĉion por si - kaj perdis ĉion. Oni tamen devas memori, ke la araboj posedas 22 landojn ; la judoj - unusolan.

Rilate la kvazaŭan respondecon pri la forpelo de la araboj, jen citaĵo el MONATO n-ro 5/83 : "... La fakto, ke la israela armeo NE forpelis la palestinanojn el iliaj hejmoj, elstare aperis en la komunismaj gazetoj de la tuta mondo en 1948. En Italio, L'UNITA, oficiala organo de Itala Komunisma Partio, altvoĉe kriis, per artikoloj kaj bildoj, ke la israelaj oficiroj estas konsilantaj, dum la milito, al la palestinanoj, NE FORLASI SIAJN HEJMOJN. Dume la arabaj registaroj diris LA MALON al la

palestinanoj, L'UNITA substrekis". Al tio ĉi mi aldonu, ke tuj post la mondmilito (1945) pli ol tri milionoj da sudetgermanoj devis forlasi Ĉeĥoslovakion pro la naziaj krimoj kontraŭ tiu lando, en kiuj tutcerte ne ĉiuj estis kulpaj. Neniam oni aŭdis pri tio, ke Germanujo incitis kaj organizis terorgrupojn por venĝi kontraŭ la ĉeĥoj ; male, - ĝi en deca formo rehejmenigis la rifuĝintojn en Germanio, tiutempe malvenkita kaj ruinigita. Jen la grandega diferenco !

Se la araboj estus agintaj laŭ la spirito de la Nobla Korano, ili laŭkomence ne strebus malhelpi la estigon de nacia hejmo por multe persekutata parenca gento, sur teritorio 700-oble pli malgranda ol Arabujo. Antaŭ jarcento, Palestino, nomita tiam "Suda Sirio", estis neglektita, duone dezerta provinco de la Otomana Imperio, havanta maldensan loĝantaron. Ĉu povis esti pli justa devizo kaj celo, ol "senlanda popolo - al senpopola lando!" ? La fruktoj de la pionira fortostreĉo de la judaj enmigrintoj altiris kiel magneto amason da araboj el la najbaraj landoj, kaj en taŭga momento ili ekarogis al si la statuson "palestina popolo".

Bedaŭrinde, la islaman religion degenerigis ĝiaj ekstremistaj adeptoj ; kun la tempo ĝi fariĝis sinonimo de fanatikismo, postiĝinteco, drogfumado, superstiĉoj, analfabetismo kaj - atentu karaj samideaninoj! - , senhonta humiliga subpremo al la virinoj. Ne hazarde la plej neevoluinta lando de Eŭropo estas Albanio. Kaj kio restis el la iama glora kulturo de Irako kaj Irano ?

Per sia mallarĝspirita envio kaj nesatigebla avideco la nunaj araboj memorigas pri la riĉega bienulo el la biblia parabolo, kiu insidis forrabi la unusolan ŝafidon de la malriĉulo.

Teddy Löwenkopf.

*****************************************************

## VORTINFLACIO

Vd. la n-rojn 47 (p.28) kaj 48 (p.36). Kdo G.M. sendis al la red. la liston de vortoj kaj vorto-partoj, kiun uzis la revuo ESPERANTO por sia "facila numero" 11/81. Li trovis ĝin en Cirkulero de la Esperanto-Centro Paderborn (FRG). Ĉu represi ĝin en "Laŭte!" ? Eble en venonta n-ro... Red.



# laŭtaj informoj kaj petoj

Anonceto : Kursfinintino, junulino deziras korespondi : Demĉenko Svetlana V. , Kieva regiono, SU 255 340 Polesskoje, per. Ĥmelevoj 13 USSR.

Unua Esperantista Olimpiko de Ŝakludo okazos de la 20a ĝis la 29a de julio 1983 en urbo KALOCSA en Hungario. Ĝin organizos D-ro Nemeth, prezidanto de Esperanta Ŝaka Ligo Internacia. Ĝi estos eksterordinare malmultekosta por ĉiuj ŝakludantoj : loĝado kaj manĝado senpagaj ! Informojn petu de Sinjoro Nemeth, Szabo ut.3, H-6300 KALOCSA, Hungario. Francoj povas peti ĉe la franca respondeculo : S-ro Yves Poupeau, 611 Quartier Galilée, F 77190 DAMMARIE LES LYS. Tel(6) 439 48 50. (Komuniko de T. Falissard.)

La Tria franc-germana Junulara Seminario okazos en Altusried ĉe Kempten (Fed. Germanio) de la 15a ĝis la 22a de julio '83. Temo : "Burĝa ĉiutago" (senaŭtoritata edukado, alternativaj projektoj, virina universitato en Berlino, memadministrataj entreprenoj/kundecidado, konkretaj utopioj de virinoj kaj viroj, pli da libertempo, pli da libereco. Loko : Altusried situas en la antaŭalpa regiono en la proksimeco de Kempten. Loĝado en renovigita bieno. En la programo kompreneble estos ekskurso al la Alpoj. Kostoj : ĝis 25-jara : 80 DM, pli ol 25-jara : 90 DM. Antaŭpagi 50 DM al pĉk Karlsruhe 545 77-754, Germana Esperanto-Junularo, Pf.10 14 22, D-2000 HAMBURG 1 Aliĝilojn sendi al Elisabeth Kuhl-Kruse, Mathildenstr.73 D-2800 BREMEN 1.

Vaŭkluza E-Federacio organizos semajno-finon por komencantoj en Kastelo Barbière (AVIGNON) la 22an kaj 23an de oktobro '83. Peti informojn de : GENTE, 9 av.des Erables 84000 AVIGNON.

La Internacia Ekspozicio de Infan-desegnoj kaj pentraĵoj farita de L.kaj G.Robert, estis en MONTAUBAN dum la lastaj tagoj de majo. Starigite en bela salono de la kulturdomo, en la urbo-centro, ĝi estis sukcesa kaj mirinda por la vizitantoj. Pluraj klasoj el la urbo venis. Jen bona rimedo por konigi samtempe la infanan arton kaj Esp-on.

## alvoko al ĉiuj!

RADIO-LIBERTAIRE, en kies kadro elsendas ĉiusemajne RADIO-ESPERANTO en Parizo, estas ĵus malpermesita de la socialista registaro ! Tio estas ofendo al la esprim-libereco, ĉar RADIO-LIBERTAIRE estas esprimilo de la liberecana movado kaj okupas la 7an rangon laŭ la aŭskultantaro en la pariza regiono, kio estas tute miriga kaj neatendita rezulto de 20 monatoj da laboro.

Malgraŭ tiu malpermeso, Radio-Libertaire plu elsendas kaj ricevas multajn subtenojn el multaj medioj : sindikatoj, progresemaj organizoj, radioj, verkistoj kaj simplaj individuoj.

Ankaŭ vi, legantoj de "Laŭte!", subtenu nian karan radion ! Jen la rimedoj :

* Sendu leterojn, telegramojn* al la ĉi-subaj adresoj:
  - M. le premier ministre, 57 rue de Varenne, 75007 PARIS
  - Mme Michèle COTTA, 100 av. Raymond Poincaré, 75016 PARIS

  aŭ peticiojn.
* Manifestu publike kun banderoloj antaŭ la francaj ambasadoj aŭ konsulejoj.

Vian SOLIDARECON ni bezonas !

La skipo de Radio-Esperanto

* Ne forgesu sendi atestojn de viaj dokumentoj al nia adreso : Radio-Libertaire, 145 rue Amelot,75011 PARIS

Internacia Esperantista Pikniko, dimanĉon 21an de aŭgusto, okazos en la vilao "Sunradio" de René LLECH-WALTER, 38 bd. de la Mer, F 66700 ARGELES SUR MER, kun la partopreno de katalunaj, nederlandaj, belgaj, rumanaj, polaj, s-anoj. Matene, je la 11a, komuna banado en Mediteraneo ; je la 13a pikniko en la ĝardenoj de "Sunradio" ; je la 15a, novbakito el Banyuls dels Aspres, Margareta GOUGES kantos esperante. Ĉiuj gesamideanoj feriantaj en la regiono estos kore bonvenaj.

Alvoko de Radio-Esperanto :

Jean-Pierre vojaĝis al Nikaragvo, kie li sukcesis viziti multajn esperantistojn kaj ekkonsciis pri la gravaj problemoj tie konigi la internacian lingvon. Fakte, multaj geviroj, kiuj deziras lerni Esperanton, ne kapablas akiri eĉ unu libron. Jean-Pierre, kiu parolis ĉe Radio-Esperanto 89,5 MHz en Parizo (ĉiumerkrede 14H/15H, kaj ĉiuvendrede 19H/20H) alvokas la esperantistojn de nia regiono, por ke ili sendu kurslibrojn al tiu lando, preferinde hispanlingvajn. Ni jam ricevis kelkajn librojn kaj 150 frankojn, kiuj ebligis pagi kaj sendi 90 broŝuretojn hispanlingvajn de SAT-Broŝurservo. Ni atendas viajn librojn aŭ monon (bonvolu precizigi "por Nikaragvo") ĉe: Radio-Esperanto, 145 rue Amelot, F 75011 PARIS.

Internacia Fastado por la Vivo

La 6an de aŭgusto 1983, datreveno de Hiroshima, almenaŭ 8 personoj el diversaj landoj komencos fasti dum nefiksita daŭro por haltigi la nuklean vetarmadon fare de la 5 nuklepotencaj landoj. Ili ĉiujn alvokas : personojn, instituciojn, registarojn. Ĉi-somere multaj manifestacioj internaciaj okazos samcele. Kvar francoj fastos en la Pariza regiono, la aliaj en Usono. Nuntempe ili trairas Francion por prezenti sian decidon. Aperas subtenkomitatoj, por ke la amaskomunikiloj ne plu silentu pri ili kaj por elklikigi amasagitadon.

Multaj inter ni sin demandas : "Kion eblas al mi fari?" Jen kelkaj sugestoj :

* La plej rapida kaj plej urĝa afero estas la financa helpo. Eblas sendi ĉekojn aŭ poŝtmarkojn al : Claudine MENERET, Quercy, F 82160 CAYLUS, pĉk Toulouse n-ro 383783 X
* Se vi disponas pri iom da libera tempo, eblas aliĝi aŭ starigi lokan grupon da subtenantoj. Tiu grupo rilatas kun nacia kunordigo kiel ligilo inter la landanaroj kaj la fastantoj, ĝi organizas ankaŭ ĉiujn neperfortajn agadojn necesajn por konsciigi la plimulton aŭ subteni la fastantojn.
* Se eblas al vi pli aktive partopreni dum preciza periodo al la taĉmento pri organizado kaj subtenado, aŭ al la fastado dum limigita periodo, ktp, kontaktu kiel eble plej frue la nacian kunordigon (en Francio) : Suda parto de Francio kaj D.O.M. : Pierre Lazat,Quercy, 82160 CAYLUS

Por ĉiuj aliaj departementoj : Didier Mainguy, 244 bd. Robert Schuman, 44300 NANTES.

La 24an de septembro okazos oficiala inaŭgurado de "Square Zamenhof" en PAU (Francio). Estos bonvenaj por tiu manifestacio ĉiuj amikoj de Esperanto.

Nia regiona renkontiĝo en "Lago de l'Tri Valoj" apud Lekturo (Ĝersio) arigis, spite petoleman veteron, 25 personojn el 8 sudokcidentaj departementoj. Ili venis, ŝercis, babiladis, piknikis, ktp. La raportetoj de la diversaj ĉeestantoj reliefigis la entreprenemon de la ĝirondia grupo, la dormadon de la aĝenia, la nefunkciadon de la ĝersia kaj de la tuluza. En la senklubaj regionoj estas tamen aktiveco, notinde en Montauban. Plej interesis la ĉeestantaron la klarigoj de Jean-Claude pri komputeroj kaj informad...hiko, ĝenerale. Oni ne nur aŭdis pri la rudimentoj, oni povis ankaŭ vidi praktikan uzadon de la mini-komputero de J.C.
Pro neebleco okazigi la ĉi-jaran Zamenhof-tagon en Angulemo, oni fiksis la decembran regionan rendevuon en Lotgaronio.

Ĝirondia vivo : La 2an de julio, je la 14a, ĉe Joël LAJUS, lernejo de MARCENAIS, Marcelo REDOULEZ prezentos per diapozitivoj sian vojaĝon en Finnlando kaj al Leningrado.
La 25an de septembro en VILLENAVE D'ORNON la grupo zorgos pri E-budo en la festo de Socialista Partio.

Kiuj interesiĝas pri la kutima E-Semajno en Lotgaronio fine de aŭgusto, ekzemple de la 20a ĝis la 27a de aŭgusto, bonvolu sin anonci al : C. Baudé, F 47340 LAROQUE. Babilado, broŝurado, bromenado, kaj tiel blu, estas la kutima brogramo. Tendumebleco. Kolektiva aranĝo por la biknikado.

Atentu! Okaze de la paca festo en Bordozo la 16an de aprilo, la ĝirondia grupo deĵoris ĉe E-budo. Pluraj neesperantistoj sugestis al ni subskribigi peticion por instruado de esperanto en la lernejoj. Ĉar ni ne havas novaĵojn pri la promesita leĝo, ni adoptis la ideon de tiuj simpatiantoj. Bonvolu fotokopii, subskribigi, resendi la ĉi-kunan peticion* al : Ginette GABILLON, 32 rue Renault, 33200 BORDEAUX CAUDERAN. En oportuna momento ni sendos ĝin al la taŭga adreso.
(* senditan nur al franca abonantaro, kompreneble)

Les soussignés, convaincus

- qu'une langue universelle serait un facteur de compréhension et d'échange entre les personnes et les peuples,
- qu'une langue universelle permettrait de découvrir ou d'approfondir des cultures inconnues du fait de la barrière linguistique,

estiment que l'ESPERANTO - Langue Universelle bien enracinée dans plus de 80 pays - apporterait une solution satisfaisante aux problèmes de communication.

Ils souhaitent que l'ESPERANTO soit enseigné dans les Etablissements scolaires et universitaires.

Dans ce but, ils se déclarent prêts à soutenir toutes les initiatives prises par les associations espérantistes, afin qu'un Projet de loi conforme à l'esprit de la Proposition de loi n° 1550, soit présenté, dès que possible, à l'Assemblée Nationale.

| NOMS | ADRESSES | SIGNATURES |
|---|---|---|
| | | |

# ADRESARO

# •LAŬTE!•1983•

*Adreso de "Laŭte!" :*
*CERCLE AMICAL ESPERANTISTE DE L'AGENAIS*
*F 47340 LAROQUE TIMBAUT*

*Telefono : (53) 95 71 28 matene*
*(peti BAUDE, elp: bode')*

*Poŝtkonto : 3371 74 M BORDEAUX*
*Ĉekojn kaj ĝirojn skribi profite al :*
*CERCLE AMICAL ESP AGENAIS*

******************

***En nia adresaro :***

* ĉiu povas informi pri :
  - sia naskiĝjaro (la du lastaj ciferoj), sia profesio
  - siaj ŝatokupoj (§) kaj koresponddeziroj (k)
  - sia preteco gastigi vizitantojn, eventuale laŭ iuj kondiĉoj (g)
  - sia telefonnumero (t)
* ne aperas la adresoj de tiuj, kiuj ricevas la bultenon donace, aŭ loĝas en iaj landoj, aŭ petis neaperigon de sia nomo.
* aliaj mallongigoj :
  Antaŭ la nomo : + (-ino), - (viro), x (ge-), * (grupo)

***Peras por "Laŭte!" :***

Aŭstralio : Vlado KOSEF, 58 Green St, COBAR, N.S.W. 2835
Britio : Libroservo de SATEB, Frank MAITLAND, 74 Saxon Road HASTINGS, TN35 5HH
Finnlando : S.P.HURTTA, PL 221, 70101 KUOPIO 10
Japanio : MINE Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, TAKASAGO, Hyogo-ken, 671 01
Nederlando : Bert de WIT, Leidsevaart 52, 2114 AD VOGELENZANG
Svedio : Pelle PERSSON, Svartviksv.14, 123 52 FARSTA (pĉk: 684161-3)

- Robert CASTELLÓ
C. Alzinaret,2,1c,2°
ANDORRA LA VELLA
(Vals d'Andorra)

- Oscar TOLOSA
L. de la Torre 394
RA - 2300 RAFAELA (S.Fé)

- Jim COUCH, JURA BOOKS
417 King Street, NEWTOWN
SYDNEY 2042, AUSTRALIO

- Vlado KOSEF
58 Green St., COBAR
N.S.W. 2835, AUSTRALIO

- H. KOPPEL
41 Byfield St., RESERVOIR
3073 Vic, AUSTRALIO

- S. KANAČKI
72 Jubilee St
MOUNT WAVERLEY
3149 VIC, AUSTRALIO

- M. LEEREVELD
Heathe Grove
BELGRAVE SOUTH
3160 VIC, AUSTRALIO

+ J. LEHANE
2-A Harms St., TOOWOOMBA
4350 AUSTRALIO

- R. SMEETS
70 Fairfield St.
MT. HAWTHORN, 6016 W.A.
AUSTRALIO

* Cl. STAQUET
(Brusela Grupo)
Rue du Laurier 14
B - 1170 BRUXELLES

+ Stella DE WEERD
Rubensheide 61
B - 2080 KAPELLEN

- J.C. THUMERELLE
Place de la Station 16
B - 7790 WARNETON

+ Lilia LEDON DA SILVA
Rua Maria Aparecida
Anacleto, 111
04809 SAO PAULO - SP
BRASIL - BRAZILIO

- Ralph CLEMENTS
41 Brabourne Crescent
BEXLEYHEATH Kent
DA7 5QJ ENGLAND

- R. SELF
Minters, High Street
Willingham,
near GAINSBOROUGH,
Lincs., DN21 5JZ, ENGLAND

- Charles FRANCE
73 Adelaide Street
FLEETWOOD, Lancs.FY7 6EE
ENGLAND

- Frank C. DANSON
7 Infield Park
Barrow-in-Furness
Cumbria LA13 9JL,
ENGLAND

- Owen Mc GHEE
3 Arragon Road
LONDON E6 ENGLAND

- Ronald HOOK
46 Tenth Ave, BLYTH
Northumberland, NE24 2PT
ENGLAND

- D.J. PORTER
82 Orlingbury Rd, Isham
Kettering, Northants
NN14 1MW ENGLAND

- Frank MAITLAND
74 Saxon Rd, HASTINGS
East Sussex TN35 5HH, ENGLAND

- J.C. RAPLEY
95 Swakeleys Rd
Ickenham, UXBRIDGE
Middx,UB10 8DH, ENGLAND

- Gunnar JÖRGENSEN
Skovstraede 7
DK 4880 pr. NYSTED

+ Sirkku KOIVU
Väinölänk 17G58
SF-00610 HELSINKI 61

- Oiva Vehmas
Kuoppamäentie 40 C/19
SF - 33800 TAMPERE 80

- S.P. HURTTA, PL.221
SF-70101 KUOPIO 10

- Daniel LUEZ
1 rue V. Faglain
F 02000 LAON
(24,lingvoinstr) §: lingv,klas.muz, vojaĝoj, genealogio.

+ RUIZ, Mirabeau
F 04510 MALLEMOISSON

- André NAUDÉ
4 av. des Chauvets
F 06610 LA GAUDE
(11,em.inst) t:(93)24 85 76

+ Clarisse MOUNIER
44bis bd Gambetta
F 06000 NICE

+ P. BARITEAUD
8 ch.du Souvenir
Qu. Ste Brigitte
F 06130 GRASSE

- R. DELAGNEAU
Ch.de la Billoire
F 06640 ST JEANNET

* VIVARA STELO
Chemin de Baza
F 07200 AUBENAS

+ Paulette BASCOU
Rue de l'Esperanto
F 07000 PRIVAS

- Raymond PONS
Ch. du Pinjaqua
VERNIOLLE
F 09120 VARILHES

- Pierre FORT
19 rue Joffre
FONTAINE LES GRÈS
F 10170 MERY S/SEINE

- F. PIEDRAFITA
84 ch. Combetalade
F 12130 ST GENIEZ d'OLT

- M. DUC GONINAZ
Val St Georges
Ch. de l'Echelle
F 13100 AIX

- Marcel JULLIEN
18 av. H.Pontier
F 13100 AIX

- Quirin IMELDI
Trav. Ricard,Logis Neuf
F 13190 ALLAUCH

- Jean CALAMY
38 Les Nègles
F 13420 GEMENOS

- Louis PELLETIER
Parc l'Entrauno 7
F 13720 LA BOUILLADISSE
(10) §: okcitana movado, etnismo.

- E. RAYMOND
9 rue Louis Astruc
F 13005 MARSEILLE

- François GARRIGUE
Le Trinidad
68 av. Pointe Rouge
F 13008 MARSEILLE

+ Emilienne BOUVIER
236 Rte Nle St Louis
F 13015 MARSEILLE

- Claude ROUX
16 bd des Pins,Les Borels
F 13015 MARSEILLE

- Yves NICOLAS
13-37 Quartier du Bois
F 14200 HEROUVILLE ST CLAIR
t: 95 11 81

- F. TAILPIED, La Marvento
HENNEQUEVILLE
F 14360 TROUVILLE S/MER

x I & G. MARTINEZ
53 rue du Minage
F 16000 ANGOULEME

- Pierre TERCENIER
Pavillon 28 VR Les Buries
17260 GEMOZAC

- J. MANCEAU
Lormont-Haut ,Foncouverte
F 17100 SAINTES
(12,inĝ. kemiindustria konstruado)
t:(46)93 39 80. Perf. E-kurso.

- J.P.ORLIANGE
Tarnac
F 19170 BUGEAT

x A.& J.GIMBERT
Imp. Aygueparse
F 19100 BRIVE

- Roger MILON
49 av.Alsace-Lorraine
F 19100 BRIVE

- Pierre CARDONA
Cornouaille,Le Gouray
F 22330 COLLINEE

+ DESCHAMPS
Le Tertre
St Samson sur Rance
F 22100 DINAN

+ Maïté ELISSALDE
53 cité des Bruyères
Trélivan
F 22100 DINAN

x C.& JL. PAUL
Ecole publique
F 22690 PLEUDIHEN

SAT 22. Ecole publique
F 22690 PLEUDIHEN

x P.& C. FLOURY
Ecole publique
F 22690 PLEUDIHEN

- S.GUILLOU
Ch. du Terron
Kérity
F 22500 PAIMPOL

+ Gaby TREANTON
Saint Quay
F 22700 PERROS GUIREC

x M.& J. PAUL
19 lot. du Minerai
F 22210 PLEMET
(48,51,instr.) t:1696 28 62 91
§: fot,muziko (gitaro k lernig.)
g: senpage,eĉ familio ne tro granda!

- Jean PAUL
3 rue Ville-Bastard
F 22000 SAINT BRIEUC
t:(96)61 27 29

- A.L. PERAIRE
18 rue de l'Isle
F 22380 ST CAST LE GU.

- Michel MARTIN
45 rue Jouhet
F 23000 GUERET

- Marcel CURNIER
29 rue Beauferrier
F 24100 BERGERAC
t: (53)57 28 75

+ RAEL SAINTE CROIX
34 rue JJ.Rousseau
F 24100 BERGERAC

- B.G. DELALOT
Rte de Serres
F 24500 EYMET
(15,em) Franco,E-isto,Mondcivitano
Socianisto (respondas demandojn pritio )

- Joël LAPORTE
Rte de Bergerac
LE FLEIX
F 24130 LA FORCE

- Jacques GREGOIRE
32 rue Paul Dumas
F 24000 PERIGUEUX
(25,instr) t:(53)08 68 11
§: okcitanaj problemoj,alternativaj eksperimentoj,komunumoj,gazetoj, presejoj,librejoj,ktp.

- F. DITACROUTE
Rd Point J.Jaurès
F 24430 RAZAC L'ISLE
t:(53)54 65 37

x COULON, 2 rue Galilée
F 25000 BESANCON

- Espartaco GABALDA
20 rue des Jardins
F 26500 BOURG LES VAL.

+ Madeleine CEZARD
"Les Grillons"
F 26540 MOURS STE EUSEBE

- G. DUMONT
11 rue Liberté
F 26110 NYONS

+ Geneviève MOURE
Verclause

F 26510 REMUSAT

+Chantal HERVOUET
10 rue A.Derain
F 26000 VALENCE

+ Annie BOUTROUILLE
12 rte de Gaillon
Villers sur le Roule
F 27940 AUBEVOYE

- Patrick CHEVIN
F.J.T., 13 imp.St Exupéry
F 29000 QUIMPER

- Rolph PELLETIER
Mas du Rieusset
F 30480 CENDRAS
t:(66)30 20 36

- Lucien ANGEVIN
rue Lazare Bernard
F 30740 LE CAILAR

- Raymond LAVAL
13 rue Rabaut-St-Etienne
F 30000 NIMES

- Paul TOURON
3 rue Combret
F 30000 NIMES

- René DUREL
1 ch.de la Fageolle
F 31190 AUTERIVE

- Marcel AUBERGER
rue Garenne
F 31620 FRONTON

+ L. GAUBERT
13 rue Castelbou
F 31200 TOULOUSE

- A. MEMBRADO
9 rue de la Cerdagne
F 31300 TOULOUSE

- Jean EYCHENNE
20 rue du Midi
F 31400 TOULOUSE

- Robert PONTNAU
13 imp. Deux-Sèvres
F 31400 TOULOUSE
(47,prof) t:25 01 07

- Stéphane LOUART
1 rue Lamartine
F 32000 AUCH

+ Yvonne BADOR
(nur somere)
Rte du Piot, Mons
F 32500 FLEURANCE
t: 06 06 60

- E. DAZUN, Rte de Ponsan
MONTLAUR BERNET
F 32140 MASSEUBE

- J.C. BOURGEAT
St Puy
F 32310 VALENCE/BAISE

+ TEMPLIER
7 rue Nelson-Barrau
F 33740 ARES

+ Odile BADET
5 cours A.Briand
F 33000 BORDEAUX

- J.P. BAUDE
76 rue Rousselle
F 33000 BORDEAUX

x Gekdoj DEMONTOUX
2 rue François Lévêque
F 33300 BORDEAUX
(19,em) t:(56)50 40 18

+ Nicole DEMONTOUX
40 rue Poudensan
F 33000 BORDEAUX

+ Ginette GABILLON
32 rue Renault
F 33200 BORDEAUX
(30 desegn.prof) t:08 50 12

+ Simone GAILLARD
27 rue Caillou
F 33200 BORDEAUX
(20,em.instr). t: 28 08 96

+ Rose CAMPAGNE
17 rue E.Colonne
F 33300 BORDEAUX
(25,instr)

- Jean-Luc BERARD
Grand Parc CS-18
rue Maryse Bastié
F 33300 BORDEAUX

- G. LAFFITTE
2 rue François-Lévêque
F 33300 BORDEAUX

- Marcel REDOULEZ
11 rue René Descartes
F 33150 CENON

x G. & L. ROBERT
11 rue Frères-Lumière
F 33150 CENON
(20,14, em.instr) t:86 32 80
k: pĉt al multaj landoj :
Japanio, S, NL, YU.

+ Gisèle GIZARD
39 av. St Médard
F 33320 EYSINES
(38,sekret.) t:285318
ŝ: muz,tea,lit.

- E. ROBIN , 28 rue JF. Millet
Rés. Le Derby
F 33320 EYSINES

* Assoc. Espérantiste
de Gujan, Mairie
F 33470 GUJAN MESTRAS

- DUMONT
36 rue Camille-Dignac
F 33470 GUJAN MESTRAS

+ S-ino GOURGUES
26 rue Paul-Bataille
F 33470 GUJAN MESTRAS

- P. SEVILLA
108 c.de la Marne
F 33470 GUJAN MESTRAS
t:66 00 70

+ Ch. BARTHEROTE
Toulenne
F 33210 LANGON

- H. DUFOURG
12 rue J.Ferry
F 33210 LANGON
(28,instr) t:63 23 37.
ŝ: tabloteniso

+ Simone BERNARD
171 rue Poincaré
F 33110 LE BOUSCAT

+ Y. BEGLOT
11 rue Jean-Moulin
F 33260 LA TESTE

+ Marie-Claire TRAVERSE
3 rés.Clair-Soleil
Carignan
F 33360 LA TRESNE

+ H. CHAILLOT
5 av de la Réousse
Dune de l'Herbe
F 33950 LEGE CAP FERRET

- R. PERDRAUD
22 rue H.Vinson
F 33500 LIBOURNE

- Joël LAJUS Ecole
F 33620 MARCENAIS
t:(56)68 70 60

+ Maryse GOTTIN
21 av.Château d'eau
F 33700 MERIGNAC
(52,instr)

- A. ARTIGAS
13 rue Marceille H
F33140 VILLENAVE D'ORNON

+ DUVERDIER
11 rue Courteline
F 33140 VILLENAVE D'ORNON

- Michel BAURET
17 rue Utrillo
F 33140 VILLENAVE D'ORNON

x J.F. GAUDONEIX
Gauriaguet
F 33240 ST ANDRE CUBZAC

- Roland LEVREAUD
18 rue Couraud
F 33240 ST ANDRE CUBZAC
t:(56)43 09 39

- Michel LAVERGNE
"La Garenne", IZON
F 33450 ST LOUBES

x H.& M. COURBIN
"au Roux", Bonnetan
F 33370 TRESSES

+ Denise GOTTIN
Noaillan
F 33730 VILLANDRAUT

- Paul BRUNEL
Rossigné, Les Aires
F 34600 BEDARIEUX

- Christian BELIN
4 av Pdt Wilson
F 34500 BEZIERS

+ Denise CASTELLÓ
25 rue St Simoniens
F 34500 BEZIERS

* CERCLE BITERROIS
D'ESPERANTO, 9 r.Picot
F 34500 BEZIERS

+ Irma PROUD'HOM
114 rue l'Aniel
MARAUSSAN, 33370
CAZOULS LES BEZIERS

- L. ENSUQUE
1 rue Piboules
F 34100 MONTPELLIER

- L. LENTAIGNE
3 av de la Gaillarde
F 34500 MONTPELLIER

- J.C. LANG
Montplaisir
Castelnau de Cuers
F 34120 PEZENAS

- Marcel PAILHES
4 rue Henri Mas
F 34320 ROUJ AN

x JF & G. PASSARELLA
6 rue du Porche
F 34290 SERVIAN
(dez.interŝanĝi poŝtmarkojn)

+ Johana BES
Rte de la Cadelle
F 34680 ST GEORGES D'ORQUES

- Pierre LEHALLE
41 bd Jaurès
F 35300 FOUGERES

+ Martine MARCHAND
& Jacques LE MEE
Lamothe Beaumanoir
F 35720 PLEUGUENEC

- F. BARONNET
65 Croix de Laumay
F 36200 ARGENTON/CREUSE

- Martial BARRY
Chevalerie
Croix Touraine
F 37150 BLERE

- Gérard ROLLIN
Ecole de CERELLES
F 37390 LA MEMBROLLE
(50,instr) t:(16-47)41 38 41
ŝ: pacismo,sociologio,mondcivitaneco
vegetarismo. g:senpage 2 aŭ 3 personoj
sed nepre anoncu vin

- Marcel BOULOISEAU
2 Pré de la Vigne
Ste Catherine de Fierbois
F 37800 STE MAURE

- JC. PICQUET
25bis rue du Lt Roze
LA RICHE
F 37000 TOURS

- A. JACQUEL
61 av.J.Vallès
F 38400 ST MARTIN D'H.

x C.& JL.DUGAS
La Guilloterie
F 44340 BOUGUENAIS

+ H. CORTES
12 rue J.Callot
F 44100 NANTES

+ Monique LOUBIERE
24 r.Sylvain Royé
F 44100 NANTES

- F. VINCE
Rue Dr Bichat
"Hejme"
F 44600 ST NAZAIRE

- A. RIBAS
3 r.Champs-de-Veaux
F 45190 BEAUGENCY

- Roger CUQUEL
209 rue Dr Ségala
F 46000 CAHORS

* LA KRIZALIDO
Teatro Internacia de Akvitanio
Solène GASPARD, Arno
LAGRANGE kaj Anaïs
15 rue Clermond
F 46100 FIGEAC
g:(en modestaj kondiĉoj)
ĝis 3 homojn (sin anonci)
ŝ: precipa: teatro.

- Jean RAGOT
42 La Grèze
F 46220 PRAYSSAC

- Lucien BEOLETTO
rue du Stade
F 46200 SOUILLAC
(t:(65)37 88 87

+ Aline MAS
La Durantie
Lanzac
F 46200 SOUILLAC

- Jean ROYER
7 rue Puy d'Alon
F 46200 SOUILLAC

x SIGNORET
Rue de Timbergues
F 46200 SOUILLAC

- H. BENAIM
Rue Chanoine-Marboutin
F 47000 AGEN
(t:66 42 47)

- R. LABROILLE
11 rue JS.Bach
F 47000 AGEN

+ R. CHASSARD
BP.195
F 47007 AGEN
(t:95 62 93)

+ Denise LAFFARGUE
av. Comarque
F 47260 CASTELMORON
(t:79 95 41)

+ Marie LAUTARD
Rte d'Aiguillon
F 47320 CLAIRAC

- Jacques SIMONET
Rte de Tonneins
F 47320 CLAIRAC
(t:88 50 23)

Alain RAYNAL
Rte du Boscla,St Vite
F 47500 FUMEL

- Maurice BEZOMBES
PTT, F 47420 HOUEILLES

- Christian BAUDE
Gare SNCF
F 47340 LAROQUE TIMBAUT
(39,fervoj) t:95 71 28 matene
ŝ:ekol,anark,ĵazo

+ Germaine ROUX
Rte de Villeneuve
F 47150 MONFLANQUIN
t:36 41 43. ŝ:muz,koresp.

- J.C. GIONCO
Labarthe, Villeton
F 47400 TONNEINS
t: 79 17 75

- Marius ANDRIEU
Lartel, Masquières
F 47370 TOURNON D AGEN.
t: 71 73 09

+ Johana BOST
9 rue Fontanelles
F 47300 VILLENEUVE/LOT

+ H. DUCHAMPS
18 rue Gén. Gouget
F 47300 VILLENEUVE/LOT
(25,poŝt) t:70 78 71

- Pascal CANAVATE
6663 CD de Eysses
F 47307 VILLENEUVE/LOT

+ Marcelle MAURIN
L'Empery
F 48100 MARVEJOLS

- Jean HENIN
Beauregard
Rte de Montcayroux
F 48500 LA CANOURGUE
t:(66)32 86 36

- R. SARRUT
8 rue du Pontet
F 48200 ST CHELY D'A.

- H. PLAISANT
2 rue de la Cité
Bourgneuf en M.
F 49290 CHALONNES/LOIRE

- Robert DUGRE
Bazougers
F 53170 MESLAY
(21,em.fervojisto)

- R. DEGRELLE
BP.23,
F 54510 TOMBLAINE
(31 katolika pastro)
ŝ:E-libroj k ties vendado
t:(8)321 00 48

- Petro LOUIS
19 rue Sigisbert Adam
F 54000 NANCY

- Sébastien BRETON
15 rue Vieux Pont
F 56620 PONT SCORFF

- Alain LEHALLE
7 allée Pré à Fey
F 57420 VERNY

- Daniel DAVID
44 rue de Lens
F 59190 HAZEBROUCK

- Jacques MARTIN
48 rue R. Salengro
F 59260 HELLEMMES LILLE

- P. MEUNIER-GUTTIN
9 rue Ancienne Poste
F 61300 L AIGLE

- Boguŝo SAMBOREK
10 rue Saint-Saëns
F 62590 OIGNIES

- Jacques DECOBERT
45 av. Béziou
F 64140 BILLERE
t:(59)32 55 93
ŝ: E-grupoj,naturismo,montaro, amo. (21,instr)

- F. OLALLA
Foyer Logement Bât.C
appt 10
F 64340 BOUCAU

+ Colette CHIALVO
Poste principale
F 64700 HENDAYE

- Robert LLOANCY
5 r.Léonard-Constant
F 64000 PAU
t:(59)30 27 84

- Michel ZAKOWSKY
7 rue Corisande
F 64000 PAU

+ Yvonne BADOR
3 rue Descartes
F 65000 TARBES
t:(62)36 16 22

- Aristide LAGOUTTE
Le Hameau au Soleil, Bât A
F 66700 ARGELES PLAGE
(14,em) t:360611. E-isto de 1934

- Jorgos COMTE
Mas Can Vila
Vallée du Bonabosc
F 66150 ARLES / TECH

- Jean AMOUROUX
1 rue de Sorède
Moulin à vent
F 66000 PERPIGNAN

- Martin BUSTIN
2 rue du Musée
F 66000 PERPIGNAN

- Jean FERNANDEZ
21 rue Matisse
F 66000 PERPIGNAN

- Ch. GERARD
4 rue Dr Rives
F 66000 PERPIGNAN

- René LLECH WALTER
72 av. Gén.de Gaulle
F 66000 PERPIGNAN

LJO (Terano)
Llugols
Ria Sirach Urbanya
F 66500 PRADES
ŝ:biologia ĝarden., amatore botaniko, kuracplantoj,fabrikado de fantaziaĵoj aŭ kapricaĵoj por homara idiotaro...
g: en primitivaj kondiĉoj (nek elektro,nek gaso...)

- C. BOUMAL
28 rue Canigou
F 66300 TERRATS

- Michel QUER
45 rue des Ecoles
F 66160 LE BOULOU

+ Jacqueline LEPEIX
82 av. Jaurès
F 67100 STRASBOURG
(51,bibliotek.) t:(88)440291
g: 1 personon aŭ paron, sed nur post skriba konsento,k nur E-istojn

- Michel MASSON
126 La Chapelle
le Bonhomme
F 68650 LAPOUTROIE

+ Antonia FERNANDEZ
19 rue Jean Cocteau
F 69330 MEYZIEU
t:(7)831 75 88

- Pierre DEHAN
35 ter,r.Cdt Charcot
F 69110 STE FOY LES LYON

- Lorenzo TOMEZZOLI
La Garenne
F 71700 TOURNUS
(43,mat.prof) t:(85)51 09 60

- V. CAUDET
Les Avanchers(chef-lieu)
F 73260 AIGUEBLANCHE

- René VILLEGIER
47 ch. de Join
St Innocent
F AIX LES BAINS

- Michel HAREN
589 av. Gén. Cartier
F 73000 CHAMBERY

- Serge SIRE
16 ch.de l'Abbaye
F 74000 ANNECY LE VIEUX

+ Thérèse PINET
5 rue de la Banque
F 75002 PARIS

- Gérard LIEBLANG
27 rue Taine
F 75012 PARIS
t:340 56 79

- Yves PEYRAUT
89 av. Michel Bizot
F 75012 PARIS
t: (16)1345 67 74

- Max TRENNER
166 av. Daumesnil
F 75012 PARIS
(02,em) t:343 37 68
ŝ: kor.pri morgaŭa senmona vivo.
Pseŭdonomo : "nn"

+ Jacqueline JEAN-LOUIS
13, rue N. Fortin
F 75013 PARIS

- Remo MAGNANI
83 rue Lemercier
F 75017 PARIS

- J.L. BERGEON
14, rue Bouret
F 75019 PARIS

- Yvon POUPEAU
611 quartier Galilée
F 77190 DAMMARIE LES LYS
(50,desegnisto) t:(6)439 48 50
ŝ: ŝako,ontologio

- Armand LOPEZ
52 rue Thiers, Nanteuil
F 77100 MEAUX

- Thierry FALISSARD
6 r.de la Porte Rouge
F 77170 SERVON
(59,inĝ.pontoj) ŝ:ŝako,leg.
t: 405 10 57

x G & E. MAFFIOLO
153 rue des Landes
F 78400 CHATOU

- Laŭrenco ARROYO
51 allée Debussy, app.306
F 78190 TRAPPES

+ O.H. MEUNIER
Foyer de la Coudraie
"Les Glycines"(n°45)
F 79000 NIORT

- Pierre LANDARD
appt 475, 21 r.Mac-Orlan
F 80000 AMIENS

- Robert ARNAUDET
40 rue Ingres
F 81000 ALBI

- Henri RAMBOUILLET
19 r.Denfert-Rochereau
F 81600 GAILLAC

+ Suzanne CALAS
27 rue Cathalo
F 81270 LABASTIDE ROU.

- Jean COSTES
Rieucourt, Terssac
F 81150 MARSSAC/TARN

+ Nicole DEJEAN
14 rue A.France
F 82000 MONTAUBAN

+ Carmen HONORIUS
90 av Bellevue
F 82000 MONTAUBAN

+ Roza SARROCA
19 Chevalier Toile
F 82400 VALENCE D AGEN

+ Michèle FREUD
120 av Calmette
F 83300 DRAGUIGNAN
(35) t:(94)684917
ŝ: fot, leg, piedekskursi

x POUPEAU, Anthéor
12 bd Eucalyptus
83700 ST RAPHAEL
(16) ŝ: fot,poezio,iridologio

- R. GIEURE, "Liber"
ch. Reboeuf
F 83210 SOLLIES PONT

x Hélène & André GENTE
9 av des Erables
F 84000 AVIGNON
(22,21,em.inst) t:(90)885749

- Roger MOTTO
27ter av Moulin N-Dame
F 84000 AVIGNON

- André DELAYE
Modene,
F 84330 CAROMB

- R. DESPUJOLS
96 rue des Tuilières
F 87100 LIMOGES

- J.L. CLAUDEL
La Vieille Grange
F 88600 BRUYERES

- Robert DURAND
3 groupe Ellen
F 88000 EPINAL

+ Nereida MARTINEZ
50 r du 4 septembre
F 91430 IGNY

- Jean TUFFIER
43bis, rue Billancourt
F 92100 BOULOGNE BILL.

- Daniel TERTRE
Rés. "PTT-Clichy"
127 bd J. Jaurès
92110 CLICHY LA GARENNE

- Roger NAULLEAU
134bis rue du Chatou
F 92700 COLOMBES

- Henri MASSON
82 rue du 22 septembre
F 92400 COURBEVOIE

+ Denise BETTMAN
123 rue Malabry
F 92350 LE PLESSIS ROB.

+ Raymonde SELLE
17/19 rue Paul Bert
F 92120 MONTROUGE

- J.S. BRILLEAUD
7 rue Frères-Lumière
F 92500 RUEIL
t: 751 47 58

* ESPERANTO DE RUEIL
44 rue Dr Guionis
F 92500 RUEIL
t: 732 23 77

- André LEGROS
22 av Daumesnil
F 93140 BONDY

x Sylvie LEDUC
& Patric KRUISSEL
46 rue Gabrielle
F 93700 DRANCY
- M. TERNANT
5 ch. du Gros Buisson
F 93800 EPINAY
t:(1)822 55 09

- Albert HAUSTRATE
16 rue des Caillots
F 93100 MONTREUIL

- Bruno COMENTALE
12 rue J Jaurès
F 93230 ROMAINVILLE
(63,studento geografio) ŝ:geo.

- Roland GRANDIERE
68 allée de la Tour
F 93250 VILLEMOMBLE

- Lucien UZE
25 av. Rond-Point
F 94360 BRY SUR MARNE

x G. YVON & C. PALIOT
10 av de la Résistance
F 94260 FRESNES
ŝ: pac,naturismo, g:2 pers.maks.

+ Francisca MARTINEZ
Rés "Les Oeillets"
17 rue Kléber
F 94200 IVRY

- G. LEBEC
10 rue Mermoz
F 94360 JOINVILLE LE P.

+ Thérèse SABATIER
21 rue Pasteur
F 94490 ORMESSON

+Juliette BOYER
5 allée des Glycines
F 94320 THIAIS

- Bernard SCHNEIDER
38 av. République
F 94320 THIAIS

- C. CAVALIE
8 rue de l'Eglise
F 95520 OSNY

+ Cordelia LERICHE
3 allée des Roses
F 95250 BEAUCHAMP

- Jean DEQUAIRE
40 lot;SATEC
chemin Lagourgue
F 97440 SAINT ANDRE

- Didier IZACARD
Windscheidstr.12
D-1000 BERLIN 12
t:030/3239388

- Kurt SCHUT
Heresbachstr. 35
D 4230 WESEL

- K.H. KERSTING
Bredowstr.3
D 4300 ESSEN 1

+ Ursula BÖHRINGER
Eisenbahnstr.5
D 7415 WANNWEIL
(63,edukistino) t:07121/54642
ŝ: muz (kanto, gitaro, diskoj)

- Kurt FISCHER
Breslauer str.15
D 8761 BÜRGSTADT

- *José BERNABÉU*
*Gral Primo Rivera 6*
*CALLOSA DE SEGURA*
*(Alicante) HISPANIO*

- *Adonis GONZÁLEZ MEANA*
*str.Marcelino Gonzalez, 5.4°D*
*GIJON - 9 HISPANIO*

- *G. MOYA ESCAYOLA*
*Balmes 38 3°*
*TERRASSA (Barc.)*
*HISPANIO*

\+ *Carmen LLAPART*
*Paseo Gral Peralta 6A*
*GIRONA HISPANIO*

- *F CASTAÑO VALLINA*
*C.Magnus Blikstad n°17-4°J*
*GIJON HISPANIO*

- *Jesus PÉREZ*
*Apartado 27 066*
*BARCELONA HISPANIO*

- *F. KRISTJANSSON*
*Byggdavegur 41, PK 62*
*602 AKUREYRI ISLANDO*

\+ *Gisella MARCHIONI*
*Via A.Costa 16*
*I 21013 GALLARATE (VA)*

\+ *TANAKA Yosino, Mori-so*
*Kamizyuzyo 3-4-6,Kita-ku*
*TOKIO*
*114 JAPANIO*

\+ *HUKUNAGA Makiko*
*Motida-kata 2-A*
*Saginuma 1-10-5*
*Miyamae-ku*
*KAWASAKI-SI*
*213 JAPANIO*

- *YOSIDA Katuhide*
*Kubiri-tyoo 1-16*
*YOKOSUKA-SI*
*239 **JAPANIO***

-*ADATI Tyotaro*
Tuzido-higasikaigan 1-15-7
*HUZISAWA-SI*
*251 JAPANIO*

- *OOTAKA Akio*
Kugenuma-Huzigaya 2-5-14
*HUZISAWA-SI*
*251 JAPANIO*

\+ *YAMAKAWA Setuko*
*Soka 1-3-4*
*SOKA-SI*
*340 JAPANIO*

- *SIMIZU Kooiti*
*Sinden 2-4-10*
*KAMIHUKUOKA-SI*
*356 JAPANIO*

- *JAMASAKI Motohiro*
*Minakamidai 226*
*NAGANO-SI*
*381-12 JAPANIO*

- *NAKAI Taiei*
*Motosiro 19-22*
*HUZINOMIYA-SI*
*418 JAPANIO*

- *TOBOTA Koki*
*Sikayama 2-90-203*
*Midori-ku*
*NAGOYA-SI*
*458 JAPANIO*

* *NAGOYA ESPERANTO-CENTRO* Toŝin-bild 214
Higaŝi - Sakura 2-ĉome, 13-23
*Higaŝi-ku, NAGOYA*
*461 JAPANIO*

\+ *DEGUTI Terumi*
*Ziyugaoka 3-2,2-3*
*Tikusa-ku, NAGOYA*
*464 JAPANIO*

- *WASEDA Yutaka, Syowa-ku*
*Kawanayama 93 , NAGOYA*
*466 JAPANIO*

-*ITOO Kozi*
Sangoekihigasi-mansion 305
*Sango-tyo 55-3*
*Owariasahi-si*
*488 JAPANIO*

- *YAMAGUTI Mitio, Tyausuyama*
*SUWA-SI*
*392 JAPANIO*

\+ *KOBAYASI Yasuko*
*Higasikanmaki 3-14-2*
*Takatuki-si, Oosaka-hu*
*569 JAPANIO*

- *URAKABE Sinsaku*
*Naritahigasigaoka 9-23*
*NEYAGAWA-SI*
*572 JAPANIO*

- *HIRAI Yukio, C16-304*
*5-2, Korigaoka*
*HIRAKATA-SI*
*573 JAPANIO*

- *KUWABARA Yaichiro*
*Nishigoshoda 62-5*
*Murasakino, Kita-ku*
*KYOTO*
*603 JAPANIO*

- *NUKINA Yositaka*
*Ueno-dori 3-6*
*Nadaku, KOBE*
*657 JAPANIO*

- *MINE Yositaka*
Kitahama-Kitawaki,29-16
*TAKASAGO, Hyogo-ken*
*671 01 JAPANIO*

- *OSAKI Kazuo*
*1077 Murosinmati*
*Kagawa-ken*
*TAKAMATSU-shi*
*761 JAPANIO*

- *UNOKI Takanori*
*Kyudensyataku 224*
*Sasi 3820, KARATU*
*847 01 JAPANIO*

- *JOŜIMIĈI Kooiĉi*
*Takao 2-50*
*KANAZAWA*
*921 JAPANIO*

- *Simon AARSE*
*Leegmerstraat 2 II*
*NL 1058 ND AMSTERDAM*

- *Bert de WIT*
*Leidsevaart 52*
*NL 2114 AD VOGELENZANG*

- *Lawrence MEE*
*Postbus 25041*
*NL 3001 HA ROTTERDAM*

\+ *W. v.d.BLINK*
*Almstein 133*
*NL 3085 NC ROTTERDAM*

- *DERKS W.*
*Limbrichterstr.60*
*NL 6131 EE SITTARD*

\+ *Inge de BRUIN*
*Hankemaborg 36*
*NL 7608 XJ ALMELO*

- Feiko MUNNIKSMA
Bartolottilaan 7
NL 3768 GA SOEST

- Geert de GROOT
Lange akker 1
NL 8431 PH OOSTERWOLDE

- C. de GROOT
Soetan Sjahrirweg 30
NL 9649 BJ MUNTENDAM

+ J.G. van HULST
Leidsevaart 238
NL 2014 HAARLEM

x Cécile LEGROS
Rolf ANDA, Kverme II
BRUSAND 4363, boks 113
NORVEGIO

- Czestaw STYKOWSKI
P.O.Box 90
PL 67400 WSCHOWA
(43,gvid. loka E-klubo)
§: ŝakoj,go,ludoj,PM k bk.

- Erik BJURSTRÖM
Ludviksbergsgatan 19
S 117 26 STOCKHOLM

- Hjalmar GEIST
Box 4005
S 122 04 ENSKEDE

- Pelle PERSSON
Svartviksvägen 14
S 123 52 FARSTA

x ENGHARDT
Cigarrvägen 2, 2tr
S 123 57 FARSTA

- Carlos MAYNAR
c/o Korint
Stövargatan 26
S 124 41 BANDHAGEN

- Malte GAHLIN
Vädurens gata 226
S 136 63 HANDEN

- Kurt LINDSTRÖM
Jämtlandsg. 152, 7tr
S 162 20 VÄLLINGBY

- Ivar PAULSSON
Skytteholmsvägen 29,I
S 171 44 SOLNA

- E.G. ERLANDSSON
Edv.Lindahlsgatan 143
S 217 42 MALMÖ

- Gunnar GUSTAVSSON
Abergsvägen 6
S 302 70 HALMSTAD

- Bengt ERICSON
Klareborgsgatan 3
S 414 61 GÖTEBORG

- Henrik KARLSSON
Fimongatan 12
S 590 40 KISA

- Guy COSTE
Gröna gatan 8A
S 754 36 UPPSALA

- Carlo NICOLODI
Baslerstrasse 202
CH 4123 ALLSCHWIL

- Hermann SCHMUTZ
Feldstr. 24
CH 4123 ALLSCHWIL

# S.A.T.-BROŜURSERVO

A L V O K A S   al   Ĉ I E S   M O N U J O !

Konfesu, ke ĝi ne kutimas almozpeti ! Tamen nun necesas mono por pagi modernigon de la eldonrimedoj, nome elektronikan skribmaŝinon "Hermès 40S", ĵus ricevitan, kiu ebligos vere belan aspekton de la tajpaĵoj (diversaj litertipoj, regula dekstra marĝeno, nevideblaj korektoj - la efektiva tajpado povas okazi nur post korektado per "ekrano" - ebleco ne plu faldi la ofsetplatojn, ktp, ktp). Tiu maŝino estos posedaĵo de SAT-Broŝurservo sed utilos ankaŭ al "Laŭte!". Ĝi kostas ĉ. 12 000 FF. Duonon espereble pagos la revendo de stencilgravurilo* apartenanta al la Servo kaj nun ne plu necesa. Ĝis nun, escepte de la papertranĉilo kaj la stencilgravurilo, mi mem pagis la eldonmaterialon (mimeografilo, ofsetilo, fotokopiilo, tajpmaŝinoj...). Ĉi-foje la elspezo superas mian propran financkapablon. Mi pardonpetas!

Kiel vi povas helpi ? Kiam ? - Kiel eble plej frue,

- mendante el la disponebla broŝurstoko (mendilo troviĝas en L! n°48) ;
- monprovizante por ricevi la ĉi-jarajn kaj venontajn broŝurojn ;
- per mondonacoj aŭ seninterezaj pruntedonoj.

Antaŭdankas via, Baudé Kribo.

______

* "Rex Rotary 2002" kvazaŭ tute nova. Se Laŭtulo estas interesata... jen estos bona afero por ŝi/li.

A T E N T U !

El la listo aperinta en L! n°48 elĉerpiĝis DI (Kiel diri), IA, KK, LV, PC. DI estos reeldonita ofsete post kelkaj monatoj. Plurajn aliajn titolojn nun minacas baldaŭa elĉerpiĝo (mi tute ne garantias reeldonadon) : AD, FF, HA, HM, IS, LP, MI, NA, NH, NR, RS, AR3 (la 3a aparta novelaro argentina).

ĴUS APERIS : "La Turo de l'Popoloj"

160 paĝoj, 20 FF(kun afranko) por la Laŭtularo. Bonvolu legi la frontartikolon! Ni kalkulas kun ties bona akcepto fare de la E-publiko por pagi parton el la skribmaŝino !

---

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque. CPPAP n° 58651.